

Esperanto



Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio (en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)

103-a jaro • n-ro 1241 (11) • **Novembro 2010**

Danio, la venontjara kongreslando



**Renovigita
edukado.net**

**Kongresa
komuniko 1**

**Plej legindaj
tradukoj**

**Kalendaro
2010–2012**

Esperanto

Oficiala organo de

Universala Esperanto-Asocio

(en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)

Fondita en 1905 de Paul Berthelot (1881-1910). Establa kiel organo de UEA en 1908 de Hector Hodler (1887-1920).

Redaktoro: Stano Marček.

Adreso de la redakcio:

Revuo Esperanto
p/a Stano Marček, Zvolenská 15
SK-036 01 Martin, Slovakio
☎ +421 43 4222 788

✉ revuo.esperanto@gmail.com;
redakcio@gmail.com

Aperas:

en ĉiu monato krom aŭgusto.

Redaktofono:

la 10-a de la antaŭa monato.

Legata en 120 landoj.

Voĉlegata por vidhandikapitoj.

Abonprezo: varias laŭlande (EUR 38);
informiĝu ĉe via landa asocio aŭ ĉe la CO.
Unuopa ekzemplero kostas EUR 4,00.

Anonctarifoj (EUR): 1 p. 1000, 1/2 p. 550,
1/4 p. 300, 1/8 p. 165, 1/16 p. 90.
Movada rabato 50%.

Anoncoj sur ekstera kovrilo kostas
duoble. Rabato por tuja ripeto 20%.

Bankokontoj: 378964 ĉe ING-bank,
Postbus 1800, NL-1000 BV Amsterdam
(IBAN: NL72INGB0000378964
BIC: INGB NL2A)
42.60.51.599 ĉe ABN AMRO Bank,
Postbus 949, NL-3000 DD Rotterdam
(IBAN: NL66ABNA0426051599
BIC: ABNA NL2A).

Kreditkartoj:



Adreso de la Centra Oficejo de UEA:
Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ
Rotterdam, Nederlando

☎ +31-10-436-1044,

✉ +31-10-436-1751, ✉ uea@co.uea.org

TTT: www.uea.org

Ĝenerala Direktoro: Osmo Buller.

Enhavo

- 219 ... Malferme: Tute renovigita atendas vin edukado.net (Katalin Kováts)
220 ... Danio, la venontjara kongreslando (Ileana Schröder)
222 ... Kongresa komuniko 1
223 ... Konkursu en la branĉo "teatraĵo"! (Paul Gubbins); Belartaj Konkursoj de UEA en 2011
224 ... Sukcesaj interlingvistika sesio kaj instruista trejnado en Poznano (Ilona Koutny)
225 ... Plej legindaj tradukoj (Edmund Grimley Evans)
227 ... Kalendaro 2010 – 2012
229 ... Novembraĵoj novaĵoj pri la E-programoj de publikaj radiostacioj (Gabi Kosiarska)
230 ... Recenzoj: István Ertl pri *La arto labori kune* (sekcioj VII-X)
232 ... Reagoj: Recenzo pri recenzo (Alexander Gofen); Ne recenzi recenzon (Doron Modan); Ni estu kreantoj (Tatjana Auderskaja)
233 ... Laste aperis
234 ... Rogener Pavinski nova redaktoro de *Kontakto*
235 ... Oficiala informilo; UEA invitas prelegi en la Kopenhaga IKU-sesio
236 ... La 18-a Internacia Semajno en Katalunio (Stano Marček); Seminario de la Ĉina Sekcio de ILEI en Taiyuan (Stefan MacGill)
237 ... Apliko de Esperanto en profesia agado (Bojidar Leonov); 46-aj Baltiaj Esperanto-Tagoj (Grażina Opulskienė)
238 ... Forpasoj. Abontarifoj 2011

KOVRILPAĜE: La venonta, 96-a Universala Kongreso de Esperanto okazos "en la lando de bonstato", en Danio (legu pli sur la p. 220-222).

Estraro de Universala Esperanto-Asocio

Prezidanto (kunordigo, ĝenerala planado): Prof. Probal Dasgupta, LRU, Indian Statistical Institute, 203 B.T. Road, IN-700108 Kolkata, Barato; ☎ +91 33 2359 7731; ✉ probal53@yahoo.com.

Vicprezidanto (kulturo, kongresoj, edukado): S-ino Claude Nourmont, 2 Om Kläppchen, LU-5682 Dalheim, Luksemburgo; ☎ +352 23 66 88 64; ✉ moonmont@pt.lu.

Ĝenerala Sekretario (informado): S-ino Barbara Pietrzak, Ul. Między-narodowa 38/40a m 217, PL-03-922 Warszawa, Pollando; ☎ +48 22 252 79 21 [h], ✉ +48 6000 51 425; ✉ bpietrzak@onet.eu.

Financo, administrado, TEJO: S-ino Loes Demmendaal, Duikerlaan 160,

NL-2903 AC Capelle aan den IJssel, Nederlando; ☎ +31 10 213 33 20; ✉ l.a.demmendaal@planet.nl.

Landa kaj regiona agado: S-ino Maritza Gutiérrez Gonzáles, Avellaneda 212, e/ Gertrudis y Josefina, CU-10500 Habana; ☎ (of) +53 7 6489201, (h) +53 7 6498729; ✉ itzagutierrez@hotmail.com, mgglez@enet.cu

Scienca kaj faka agado: Prof. Amri Wandel, 767 Makabim, IL-71799 Modiin, Israelo; ☎ +972 544 548712; ✉ amri@huji.ac.il.

Eksteraj rilatoj: S-ro Stefano Keller, Case postale 6034, CH-1002 Lausanne, Svislando; ☎ +41 76 261 06 09; ✉ kellerstefano@gmail.com.

Observanto de TEJO: S-ro Gregor Hinker. **Observanto de ILEI:** S-ro Stefan MacGill.

Tute renovigita atendas vin edukado.net

Komence de 2009 evidentiĝis ke la tiam 8-jara porinstruista retejo ne plu povos funkcii, se ĝi ne estos rekonstruita kaj transmitita al alia, prefere esperantista servilo. La necesan sumon de 35 mil eŭroj por rekrei ĝin tre moderna kaj ampleksa rekordtempe kunmetis la 15 sponsoroj kaj 220 membroj de la retejo. Post 14-monata konstrulaboro ĝi en nova kostumo kaj kun efikaj kaj utilaj servoj atendas siajn uzantojn.



La 3-an de oktobro 2010 estis lanĉita kun virtuala festo la rekonstruita porinstruista retejo www.edukado.net. La unuan horon de la lanĉo ĉeestis rete trideko da esperantistoj, kiuj premiere povis admiri la renaskiĝintan paĝaron. La tiamaj kaj postaj vizitantaj membroj estis mirigitaj pro la freŝa aspekto, travidebla strukturo, novaj ebloj kaj facila uzo de la paĝaro. Ekde tiam kvardek procentoj de ili regule revenas kaj esploras la paĝaron kaj kunĝojas pro la sukceso kaj ekposedo de tiom moderna helpilo por la instruista laboro. Por ilustriti tion jen du ciferoj: la registritaj uzantoj estas pli ol 2200 kaj en la pasintaj 5 jaroj la ekzercoelŭuto superis 120 milojn.

La paĝaro ne nur teknike renoviĝis, sed ekhavis ankaŭ tutnovajn sekciojn. Elstaras el ili la mondmapo de membroj kaj alia mapo de la **Kursejo** (kun movadaj kaj lernejoj kaj kursgvidantoj), t.e. guglo-mapo, sur kiu per diverskoloraj piktogramoj estas markitaj la koncernaj lokoj. Tiel la vizitantoj facile povas trovi kursinformojn laŭ geografiaj lokoj.

Grandan sukceson havas, krom la kolekto de eldonitaj lerniloj, lernolibroj kaj uzpretaj ekzercomaterialoj, la **Panteono** de la meritplenaj instruistoj de Esperanto, por kiu la redaktejo

atendas proponojn kaj materialojn pri forpasintaj kaj vivantaj eminentaj kaj primemorendaj instruistoj.

Sciencajn celojn servas alia nova parto, la sekcio **Diplomlaboraĵoj**, kien ni alŝutas la grandan kolekto de laboroj de Edward Symoens; nome detalajn informojn pri la pli ol cento da universitataj kaj altlernejaj diplomlaboraĵoj, verkitaj en Esperanto aŭ en ajna lingvo pri esperantologio aŭ interlingvistika temo. Lia kolekto koncernas verkojn el la periodo de la jaroj 1906 ĝis 1993. En tiu laboro aktive helpas la filino de s-ro Symoens, kiu feliĉas iel kontribui kaj daŭrigi la laboron de sia patro.

Aldone, por la enretigo de la verkoj, pretigitaj en la lastaj dudek jaroj, la aŭtoroj estis petataj en mesaĝoj kaj tra aliaj forumoj. La bibliografiajn informojn – kiam eblas – ĉefe ĉe la novaj verkoj, kompletigos elŝuteblaj aldonadoj, la laboraĵoj mem, iliaj resumo aŭ recenzoj. Per tio la retejo donos riĉan materialon por esploristoj kaj studentoj estonte verkantaj pri esperantologiaj kaj interlingvistikaj temoj.

La paĝaro havas ankoraŭ dudekon da aliaj funkcioj, malfacile prezenteblaj en mallonga raporto. Pli valoras vizito kaj krosado sur maro da paĝoj (plurdek miloj) de la jam 9-jara kolekto. La retejo estis rekonstruita laŭ la planoj de la redaktoro kaj realigita de la kompetenta kaj subtenema programisto Jevgenij Gaus. La brila rezulto ne estus atingebla

sen la subteno de ESE, plie sen malavara helpo de deko da grandaj sponsoroj kaj 220 individuaj donacintoj.

Grandan dankon por ĉiuj, kiuj fidis al la projekto kaj helpis en la rekonstruo de la retejo.

Venu, vizitu kaj ĝuu la riĉecon de la plej moderna kaj riĉa faka retejo de Esperantujo.

Atendas vin www.edukado.net kaj ĝia redaktoro

Katalin Kovács

edukado.net





Kopenhago, placo de la urbodomo

Danio, la venontjara kongreslando

Faktoj pri Danio

Danio estas ofte nomata lando de bonstato, aŭ socio apogata de la ŝtato. Kion tio signifas? Fakte tiu signifo komenciĝis en la mondo de poemoj, kiam la pastro, aŭtoro kaj politikisto N.F.S. Grundtvig (1783-1871) skribis en unu el siaj poemoj pri Danio, ke la lando progresos se "malmultaj posedos tro, eĉ pli malmultaj maltro". Tiu fariĝis la formulo de la dana bonstato. Per la impostoj oni atingas finanĉan ekvilibron tiel ke ĉiuj civitanoj havas la materian bazon por akiri ne tro malbonan vivon.

La modelo signifas ke triono de la impostoj revenas al la civitanoj, ĉar la publika sektoro okupas 32% de la dungitoj, el kiuj 69% estas virinoj. Tamen oni ne plendas pro la plej alta imposto de la mondo, ĉar la civitanoj spertas ke ili ricevas ion por la mono, precipe senpagajn edukadon kaj servojn de kuracistoj kaj hospitaloj.

Eĉ se Danio kun siaj nur 43 098 kvadratkilometroj estas relative malgranda lando kompare al multaj aliaj kaj la plej malgranda el la skandinaviaj landoj, ĝi akiras altan internacian nivelon kiam temas pri evoluhelpo al malpli evoluintaj landoj.

La lando situas en la norda parto de Eŭropo, kaj konsistas el la duoninsulo Jutlando kaj 406 insuloj, el kiuj 78 estas loĝataj. Tio donas al la lando marbordon de 7 314 kilometroj. La plej alta punkto de Danio atingas ne pli ol 172 metrojn, tamen nur kelkaj regionoj estas tute ebenaj. La plej granda parto estas onda kaj prezentas multloke naturon de granda beleco.

La lando estis diversperiode loĝata dum pli ol 12 000 jaroj. La unuaj specimenoj de homaj loĝlokoj devenas de ĉirkaŭ 12 000 jaroj antaŭ Kristo. La danoj akiris internacian atenton en la Vikinga periodo, de la 8-a ĝis la 11-a jarcento, sed ne nur pozitive. En siaj nekovritaj lignoŝipoj la skandinaviaj vikingoj sentime eniris Mediteraneon de ambaŭ flankoj kaj eĉ atingis Gronlandon kaj nordan Amerikon. Ili ofte agis kiel marodistoj kaj konkeristoj. Tamen ili ankaŭ okupis sin pri paca komerco, kaj miloj da danaj kamparanoj elmigris kaj ekloĝis en Anglio, Normandio kaj laŭ la bordo de la Norda Maro.

De la 14-a jarcento Danio superregis Norvegon kaj parton de Svedio, sed kiel rezulto de milita malbonŝanco, aroganteco kaj malbona elekto de aliancanoj, la teritorio kaj la loĝantaro estis tre reduktita ĝis 1658. Dum multaj jaroj Danio militis precipe kontraŭ Svedio. Poste, en la 19-a jarcento la konfliktoj okazis kun la suda najbaro Germanio, al kiu en 1864 Danio devis cedi trionon de sia teritorio.

En Danio loĝas 5 534 738 personoj kaj 9,5% el ili estas enmigrintoj. Komuna karakterizo de danoj estas ironio, kio ofte malfaciligas al eksterlandanoj kompreni kion ili fakte opinias. La neforigeblaj rajtoj inkluzivas la liberojn pri religio kaj sinesprimo, kiuj estas parto de la Konstitucio.

Dum la lasta jarcento Danio ŝanĝiĝis el precipe agrikultura kaj fiŝista medio al industria, sen helpo de naturaj resursoj, nur danke al altedukita kaj fleksiĝema laborforto. Dum la 18-a jarcento la danoj estis precipe kamparanoj, kiuj atingis sian liberecon en 1788. Tiu fakto instigis la kamparanojn fariĝi tre



produktemaj. Al ilia spirita libereco kontribuis la impulso de N.F.S. Grundtvig, kiu fondis altlernejojn precipe por junaj kamparanoj, kie la junuloj lernis aprezi kaj uzi la lingvokapablon kaj la liberecon de pensado. Ili fariĝis memkonsciaj kaj taŭgaj bienistoj, kiuj respektis siajn najbarojn kaj povis unuiĝi en kooperativaj grupoj pri produktado kun egalrajto senrigarde al la grandeco de ilia bieno. La principo estis: unu por ĉiuj kaj ĉiuj por unu. Tiu koncepto estas imitita en pluraj landoj, kaj estas parto de la oferto de Danio al landoj kiuj ricevas danan evolu-subtenon.

Bonvenon al Kopenhago, la ĉarma urbo de la venonta UK

La venonta Universala Kongreso okazos jam la kvaran fojon en Kopenhago, kiu per tio enviciĝas apud Vieno kiel la solaj urboj kie UK okazis tiel ofte. La urbo "mirinda Kopenhago", kiel ĝi estas fame konata, estos tamen nova ankaŭ al tiuj kiuj partoprenis la antaŭan UK en 1975.

Krom esti moderna metropolo, Kopenhago proponas multajn vidindaĵojn precipe en la malnova urbocentro, karakterizata de belaj malnovaj konstruaĵoj kaj multaj turoj leviĝantaj super kupraj tegmentoj de preĝejoj kaj palacoj. La malnova urbocentro estas grandparte senaŭta kaj enhavas la plej longan piediran straton de Eŭropo.

Kopenhago estas la regurbo kaj la plej granda urbo de Danio, kun pli ol miliono da loĝantoj. Jam de 1417 ĝi estas la hejmo de la plej aĝa monarkio en la mondo, kaj la danaj reĝoj lasis siajn signojn en la urbo dum pli ol mil jaroj. La plej entreprenema reĝo, Kristiano la 4-a (1577-1648) estis aparte konstruema, pri kio atestas la kastelo Rosenborg, kie troviĝas la kronjuveloj, la Borso kaj La Ronda Turo, de kies pinto oni havas belegan superrigardon al la urbo. La reĝa familio loĝas en la palaco Amalienborg, kiu per kvar konstruaĵoj ĉirkaŭ okangula placo estas la plej bela ekzemplo de la dana rokoka stilo. Ĝi estas nepre vizitinda ĉiutage je la 12-a horo kiam okazas tie la ceremonio de gardistoŝanĝo. La faman Marvirineton oni facile atingas perpiede de Amalienborg aŭ per kanalboata ekskurso el la bela malnova ekshaveno Nyhavn (t.e., iom ironie, "Nova Haveno").



La mondfama amuzparks "Tivoli"

Malgraŭ sia malnova historio, Kopenhago estas ankaŭ moderna metropolo, eĉ se vi ne trovos nubskrapulojn en la urbocentro. Inverse, vi trovos malstreĉan atmosferon en humane proporcia urbo. En Nyhavn vi trovos unikan kafejan atmosferon kie eblas ĝui malvarmajn trinkaĵojn ĉe la kajo. Tivoli, unu el la plej aĝaj amuzejoj en la mondo, fondita en 1847, estas la plej populara turista allogaĵo en la centro de Kopenhago, kie vi povas ĝui la unikan etoson, la lumojn, la distraĵojn kaj la paradojn. En la Koncertejo de Tivoli okazos la nacia vespero, en kiu la kongresanoj havos senpagan eniron al Tivoli.

La kongresejo Bella Centro situas en tute nova urba kvartalo, Ørestad, en la suda parto de la urbo sur la insulo Amager. La kvartalo estas nomita laŭ Øresund, la dana nomo de la markolo Sundo, kiu markas la limon inter Danio kaj Svedio. La kongresejo havas propran metroan haltejon, de kie oni atingas la urbocentron irante dek minutojn norden, kaj du minutojn suden la trafiknodan stacion Ørestad. Ĉe la stacio Ørestad ankaŭ estas la aŭtoŝoseo E20, kiu apud la fervojo kondukas al la tuj proksima internacia flughaveno (kaj plu al Svedio). Sed la molaj trafikantoj ne estas forgesitaj: abundas biciklaj vojoj, kaj Ørestad limas al granda natura parko barita al la motora trafiko. Kaj se oni laciĝas biciklante, oni povas kunporti la biciklon en trajnoj kaj metroo ekster la pinthoroj!

Ileana Schröder



Statuo de Hans Christian Andersen



Absalon, la fondinto de Kopenhago





96-a Universala Kongreso de Esperanto Kopenhago, Danio, 23 – 30 julio 2011

Konstanta adreso

Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176,
NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando.
Tel.: +31 (0)10 436 1044; fakso: +31 (0)10 436 1751.
Retadreso: kongresoj@co.uea.org.
TTT: www.uea.org/kongresoj/uk_2011.html

Kongresa temo

La temo de la 96-a UK estas "Dialogo kaj interkompreno".
Ĝi ligiĝas al la Internacia Jaro de la Junularo de UN,
kiu komenciĝis la 12-an de aŭgusto 2010.

Informoj

La retejo de LKK enhavas multe da interesaj kaj praktikaj
informoj pri Kopenhago kaj Danio. Ĝia adreso: [http://
www.96uk-kopenhago.dk/](http://www.96uk-kopenhago.dk/). Por aliĝoj kaj mendoj servas
la ĝenerala kongresa retejo de UEA: [http://www.uea.org/
kongresoj/uk_2011.html](http://www.uea.org/kongresoj/uk_2011.html).

Kongresejo

La moderna kongresejo Bella Center estas ekologi-konscie
mastrumata kaj gastigis i.a. la UN-konferencon pri Monda
Klimatsanĝiĝo en 2009. Eblas atingi ĝin de la flughaveno
en 10 minutoj (kun unu ŝanĝo de trajno al metroo) kaj de la
urbocentro metroe en 10 minutoj aŭ aŭtobuse en 20-25 minutoj.

Vojaĝado

Kopenhago estas facile atingebla buse, trajne, prame kaj
aviadile. La oficiala kongresa flugalianco Star Alliance ofertas
specialan rabaton por la kongresanoj. Por ricevi ĝin necesas,
krom aliĝi al la UK, sciiĝi la kodon de la evento, SK10S11, ĉe
la rezervado de sia flugo.

Loĝado

Detalaj informoj aperos en la *Dua Bulteno*. La oferto varios
de modestaj ĝis luksaj hoteloj kaj loĝejoj, plejparte je
promendistanco de la kongresejo kaj kun favoraj prezoj.

Ekskursoj

Priskriboj pri la antaŭ-, post- kaj dumkongresaj ekskursoj
aperos en la *Dua Bulteno*.

Infana Kongreseto

La 42-a IIK okazos en la bieno Gallebjerggård ĉe Hundested en
la insulo Selando je 70 km de Kopenhago. Pli da informoj en la
retejo de IIK: <http://bertosch.free.fr/iik2011/index.html> aŭ ĉe la
komisiito Bert Schumann: bert.schumann@gmail.com.

ILEI-konferenco

La 44-a konferenco de Internacia Ligo de Esperantistaj
Instruistoj okazos en Kopenhago de la 17-a ĝis la 23-a de julio.
Ĝia temo estos "Lingva politiko kaj lingvaj rajtoj en edukado
kaj scienca komunikado". En la lastaj du tagoj okazos ankaŭ
simpozio pri la sciencaj aspektoj de la temo. Pli da informoj en
la retejo www.ilei.info/agado/Kopenhago2011.php.

Reklamiloj

La *Unua Bulteno* estas jam vaste distribuita. Eblas ankoraŭ
peti ekzemplerojn ĉe UEA. Kongresaj glumarkoj mendeblas
ĉe la Libroservo de UEA. Folio kun 12 markoj kostas € 0,90
(rabato de 1/3 ekde 3 ekz.; aldoniĝas la sendokostoj kaj, en EU,
imposto 19%).

Aliĝilo

Aliĝilo estas ricevebla ĉe la perantoj kaj ĉe UEA, kiu volonte
liveros ĝin grandkvante por distribuado kun E-gazetoj kaj
en E-aranĝoj. Eblas ankaŭ elŝuti ĝin en PDF-formato ĉe la
kongresa TTT-ejo.

Kotizoj

Ĝis la 31-a de decembro 2010 validas jenaj kotizoj
(interkrampe tiuj por la landoj de tarifo B): Individuaj Membroj
de UEA (sed ne MG) € 160,00 (120,00); MG-membro aŭ ne-
IM de UEA, € 200,00 (150,00); Komitatano/kunulo/junulo/
handikapulo, IM de UEA, € 80,00 (60,00); Kunulo/junulo/
handikapulo, ne-IM de UEA, € 120,00 (90,00). Infanoj kaj
junuloj naskiĝintaj post la 31-a de decembro 1990 aliĝas
senpage (bv. sendi kopion de pruvilo). Pagmanieroj troviĝas en
la aliĝilo, Jarlibro 2010 (p.36-37) kaj en la TTT-ejo.

Statistiko

Ĝis la 15-a de oktobro estis registritaj 197 aliĝintoj el 39
landoj.

Konkursu en la branĉo "teatraĵo"!

Floranta kaj indiĝena Esperanta dramaturgio: jen bela revo. Tamen koŝmaron prezentas la realo, almenaŭ spegulata en la rezultoj de la branĉo "teatraĵo" de la belartaj konkursoj de UEA.

Jam de ses jaroj ne estas aljuĝita unua premio. Dum tiu ĉi periodo estas proponitaj nur 29 konkursaĵoj, kontraste ekzemple al 173 en la branĉo "prozo" (en nur unu jaro ne estas aljuĝita unua premio) kaj al 48 en la branĉo "eseo".

Kaj kvante kaj, kun kelkaj esceptoj, ankaŭ kvalite la konkursaĵoj en la branĉo "teatraĵo" priplorindas. Eble, kiel notis Humphrey Tonkin en sia raporto pri la belartaj konkursoj en la jaro 2009: "Estas malfacile verki por neekzistanta aŭ nekunvokebla spektantaro; ni ne povas atendi fortan tradicion de dramverkado ĝis ni havos ankaŭ tradicion de dram prezentado, kaj tio ankoraŭ mankas."

Tute prave – sed jen situacio "ovakokina": sen renovigata menuo da originalaj dramverkoj prezentindaj kaj prezentebaj, aktoroj kaj reĝisoroj restos ĉe sia kutima dieto de tradukitaj, adaptitaj (mono)-dramoj el aliaj lingvoj kaj kulturoj. Leviĝas do la demando, kiamaniere kuraĝigi verkemulojn krei teatraĵojn, kiuj inde kontribuos al la Esperanta arto.

Tiurilate gravas la belartaj konkursoj, kiuj proponas – almenaŭ en presita formo – scenejon, sur kiu la publiko povas konatiĝi kun la plej lastaj provoj, i.a. prozaj, poeziaj kaj, evidente, teatraj. Do, por altigi la profilon de la branĉo "teatraĵo" kaj helpi konkursemulojn verki premiindajn dramojn, la juĝantoj en la branĉo – Wera Blanke (Germanio), Paul Gubbins (Britio) kaj Giuliano Turone (Italio) – listigas sube la ecojn, kiujn ili esperas trovi – aŭ ne trovi – en konkursanta dramverko.

- Teatraĵo estu prezentebla kaj aktorebla. Ĝi ne postulu tro da aktoroj / rekvizitoj / dekoracioj / efektoj. Aŭtoro pensu realisme pri la precipe amatora, ne finance subvenciata Esperanto-teatro: ĉu eblus surscenejigi la teatraĵon por UK aŭ alia kultura evento?

- Aŭtoro memoru, ke teatraĵo estas spektaklo: bezonataj estas agoj, movado (tamen motivitaj). Dialogo inter sidanta paro enuigos (ne opiniu, ke tiaĵo radiodrame taŭgas).

- Teatraĵo enhavu intrigon, kiu – ev. kun problemo solvota, solvata kaj fine solvita – drame evoluas. Kiel romano, ĝi rakontu. Dume evoluu la karakteroj de la rolantoj.

- Teatraĵo uzu bonan Esperanton kaj naturan parollingvon, aparte en nuntempa dram kun temo aktuala. Tio ne ekskludas artisman lingvon, ekz. en versdramo.

- Memorindas, ke la publiko, sen ekz. ĉiutaga televido en la internacia lingvo, malofte aŭdas Esperanton. Sidi 45 minutojn dum unuaktaĵo ne naturas. Necesas kompromisi: subtile ripeti aferojn jam diritajn. Verki Esperantan dramon postulas foje aliajn kriteriojn ol nacilingvan dramon.

- Aŭtoro iru ofte al la teatro. Notu,

kiamaniere profesiuloj ekonomie ekspluatas minimumajn rimedojn, ĉu materialajn, ĉu homajn. Ne sklave kopiu ... sed studu.

- Aŭtoro prezentu sian teatraĵon laŭeble profesie. Unua paĝo kun titolo / pseŭdonimo de la aŭtoro kaj, sube, nomoj (ev. aĝoj / familiaj rilatoj / profesioj) de rolantoj. Ceteraj paĝoj kun maldekstre klara indiko (diklitere) pri la nomo de la parolanto kaj iom dekstre la dialogo kun duobla interspaco. Instrukcioj kursive kaj interkrampe indikitaj. Ne akcepteblas piednotoj: klarigoj, se necesaj, nature enestu la dialogon.

- Ne konsidereblas, en belarta konkurso, unuŝercaj skeĉoj aŭ krudaj propagandaj scenoj, en kiuj esperantistoj "pruvas" al esperantistoj, kiom mirindas la internacia lingvo.

Esperable ĉi tiuj gvidlinioj kondukos al pli riĉaj rikoltoj en venontjaraj konkursoj. Bonŝancon!

Paul Gubbins

Belartaj Konkursoj de UEA en 2011

La gvida Esperanta artkonkurso, la Belartaj Konkursoj de UEA, invitas partoprenantojn por la 62-a fojo. La rezultojn oni anoncos en la 96-a Universala Kongreso en Kopenhago. Partopreno estas libera al ĉiuj kaj ne ligita al partopreno en la UK, nek al membreco en UEA. La konkursaĵoj devas esti neniam antaŭe publikigitaj en ajna formo, escepte de la branĉoj: infanlibroj, kanto, filmo. Oni rajtas sendi maksimume tri konkursaĵojn por sama branĉo. Validas krome la jenaj kondiĉoj:

Poezio: maksimuma longo ne fiksita.

Prozo: maksimuma longo 200 x 65 karaktroj (kvino da paĝoj).

Teatraĵoj: maksimuma longo ne fiksita

Eseo: teme ligita kun Esperanto aŭ kun la kongresa temo, proksimuma longo 400 x 65 karaktroj (deko da paĝoj); la unua premio nomiĝas 'Luigi Minnaja'.

Infanlibro de la jaro: originala aŭ tradukita libro por infanoj presforme aperinta en 2010. Unu premio.

Filmo kaj Kanto: La juĝantoj priatentos "la produktojn aperantajn sur la Esperanto-scenejo en tiuj du branĉoj kaj se ili opinias iun verkon valora, ili atribuu la koncernajn premiojn." Tamen, aŭtoroj povas mem proponi la proprajn verkojn (vidu la regularon). Oni priatentos ankaŭ proponojn de triaj partioj. Se temas pri

jam publikigitaj verkoj, la publikigo devas okazi en la jaro 2010.

Ĉiujn konkursaĵojn – en unu ekzemplero escepte de tiuj por la branĉo infanlibro kiujn oni devas havigi en kvar ekzempleroj – oni devas sendi al Belartaj Konkursoj de UEA, ĉe Michela Lipari, viale Giulio Cesare 223, IT-00192 Roma, Italio aŭ **prefere** rete al la adreso: michela.lipari@tiscali.it, indikante la elektitan pseŭdonimon por gardi la anonimecon de la aŭtoro. La absoluta limdato por ricevo de konkursaĵoj estas la 31-a de marto 2011.

Premioj: unua premio 240 eŭroj, dua premio 168 eŭroj, tria premio 96 eŭroj; nova talento 168 eŭroj; infanlibro de la jaro 504 eŭroj. Detala regularo haveblas ĉe UEA, kaj legeblas ankaŭ ĉe http://uea.org/dokumentoj/belartaj_konkursoj_regularo.html.



La grupo kun la instruistoj.

Sukcesaj interlingvistika sesio kaj instruista trejnado en Poznano

Se vi ne nur deziras, ke Esperanto estu instruata en diversaj lernejoj, sed vi mem volas ankaŭ instrui, tiam finfaru la unujaran instruistan trejnadon de UAM kaj ILEI, kiu okazas kunlabore kun edukado.net.

La kursaro jam la trian fojon akompanas la tradiciajn interlingvistikajn sesiojn en la Universitato Adam Mickiewicz en Poznano (Pollando).

La du surlokaj unusemajn sesioj (septembre kaj februare) disponigas koncize la necesajn metodikajn konojn por profesie instrui Esperanton. Post hejma kaj reta laboro la sukcesa trapaso de la fina kompleksa ekzameno kun prezento de finlaboraĵo rajtigas al la instruista diplomo de ILEI post unu jaro.

La defion alfrontis ĉi-foje 11 personoj (po 3 el Pollando kaj Hungario, 2 el Francio, po unu el Slovakio, Belgio kaj Germanio). ILEI kun UEA disponigis 4 stipendiojn kiel en la pasinta jaro. Al la alvoko de la prezidanto de ILEI Stefan MacGill al la landaj asocioj kaj landaj ILEI-sekcioj reagis nur PEA, stipendianto du polajn gejunulojn.

La motoro kaj gvidanto de la trejnado Katalin Kováts allogis la atenton de la partoprenantoj ĝis la lasta momento per verva prezento de instrumentoj kaj instrufaktoroj, disponigante amason da lernmaterialoj kaj trejnante la kursanojn pri la uzo de la nove lanĉita retejo www.edukado.net. Ilona Koutny, gvidanto de la Interlingvistikaj Studoj, traktis tiklajn terenojn de Esperanta gramatiko kaj instruadon de fonetiko, gramatiko kaj vortoprovizio.

La aktualaj kursoj de la Interlingvistikaj Studoj kompletigis la studprogramon: István Ertl skizis panoramon de la nuntempa Esperanta literaturo. La partoprenantoj povis flari ankaŭ la unuafoje realiĝantan kurson pri tradukado – specialiĝon

en la tria jaro de la interlingvistika programo: Kristin Tytgat el la Brusela Universitato enkondukis la interesigantojn en la sekretojn de interpretado kaj tradukado, István Ertl en beletran tradukadon.

Du partoprenantoj el la pasintjara grupo, Katarína Nosková el Slovakio kaj Xosé Conde el Katalunio, prezentis sian finlaboraĵon kaj sukcese trapasis la finan ekzamenon, la alia sepopo planas fari la samon dum la februara sesio.

La merkreda komuna vespero kaj semajnfine la kulturaj programoj de Arkones prezentis amuziĝon al la persistaj kursanoj. La kursanoj trovis la semajnon riĉa je programoj kaj informoj, nun sekvas la plenumo de taskoj kaj metieja kunlaboro pere de la interna diskutlisto. Voĉa intervjuo kun la partoprenantoj kaj Ilona Koutny troviĝas en la dosierujo de la renaskiĝinta edukado.net.

Pripensu la partoprenon en la nova universitata grupo post unu jaro kaj en la planata interlingvistika simpozio!

Ilona Koutny



La grupo kun István Ertl.

Plej legindaj tradukoj

La rubrikoj "Laste aperis" kaj "Recenzoj" estas bona rimedo por informiĝi pri novaj eldonaĵoj, sed kiel oni eksciu pri la plej legindaj klasikaĵoj?

Se temas pri Originala Literaturo Esperanta, la tiutitola retejo ĉe <http://esperanto.net/literaturo/> estas nepre konsultinda, sed ŝajne mankas simile bona informejo pri la literaturo tradukita al Esperanto. Cetere, ŝajnas al mi, ke ĝenerale oni iom neglektas la tradukliteraturon en Esperantujo. Tial mi kompilis la suban liston de cent plej legindaj tradukoj al Esperanto.

Por fari la liston mi konsultis kvindek da spertuloj, kiuj afable kontribuis listojn de siaj plej ŝatataj verkoj, kaj mi kombinis tiujn listojn kun miaj propraj preferoj (kaj antaŭjuĝoj). Cetere, mi intence ellasis kelkajn bonajn verkojn, por fari liston maksimume buntan. Ekzemple, mi enmetis nur unu verkon de ĉiu aŭtoro.

La listo estas nek definitiva nek aŭtoritata: ĝi spegulas la subjektivajn opiniojn de mi kaj la konsultitoj, kaj ankaŭ la hazardo ludis grandan rolon, ĉar iujn bonegajn librojn eble hazarde neniu el ni legis. Tamen, mi esperas, ke preskaŭ ĉiu povos trovi en la listo ion, kion li kun plezuro legos, kaj tiel la listo estos utila.

Mi kreis dissendoliston, per kiu eblas diskuti la liston kaj atentigi pri legindaj verkoj, kiujn mi preterlasis. Mi bonvenigas vian opinion ĉe: <http://groups.google.com/group/tradukoj>.


Edmund Grimley Evans

1. Amado: *La morto kaj la morto de Kinkas Akvobleko* (1959, portugala, tr. Pádua). Kinkas, mortinta, ekskursas kun nerespektindaj kamaradoj. 2. Andersen (1805-1875): *Fabeloj* (dana, tr. Zamenhof). Famaj fabeloj, kaj grava specimeno de zamenhofa lingvaĵo. 3. Ariyosi Sawako: *La edzino de kuracisto Hanaoka Seisyū* (1966, japana, tr. Konisi Gaku). Malfacilaj rilatoj inter bofilino kaj bopatrino ĉirkaŭ 1800. 4. Asch: *La sorĉistino el Kastilio* (1921, jida, tr. Lejzerowicz). La suferoj de juda martirino en Romo ĉirkaŭ 1500. 5. Aszlányi: *Sep vangofrapoj* (1937, hungara, tr. Somlai). Amuza romano. Senlabora inĝeniero venĝas al potenca ŝtalreĝo. 6. Atxaga: *Memoraĵoj de eŭska bovino* (1991, eŭska, tr. Arana). Misteraj okazaĵoj en apudmontara bieno, el la vidpunkto de bovino. 7. Baudelaire: *La floroj de l' malbono* (1857, franca, tr. diversaj). Poemaro pri sekso kaj morto kaj la tragedio de senespera solulo. 8. Bengtsson: *Orm la ruĝa* (1941-1945, sveda, tr. Nilsson). Aventuroj en la deka jarcento, en humura pseŭdoarĥaika stilo. 9. Boccaccio: *Dekamerono* (1350-1353, itala, tr. Waringhien kaj Martinelli). Tri dekonaj el eble la plej konata novelaro de la monda literaturo. 10. Borges (1899-1986): *La sekreta miraklo* (hispana, tr. diversaj). Elektitaj prozaĵoj kaj poeziaĵoj de la fama argentina verkisto. 11. Borovský: *La bapto de caro Vladimir* (1855, ĉeĥa, tr. Pumpr). Satira kaj amuza versaĵo pri la unua kristana caro. 12. Brecht: *Trigroŝa romano* (1934, germana, tr. Schulze). Socikritika romano de la fama poeto kaj dramisto. 13. Bulgakov: *La majstro kaj Margarita* (1966, rusa, tr. Pokrovskij). Moderna klasikaĵo pri Moskvo, Jerusalemo kaj balo ĉe Satano. 14. Buzzati: *La dezerto de la tataroj* (1940, itala, tr. Mistretta). Soldatoj tutvive atendas malamikon, kiu neniam venas. 15. Cabell:

Jurgen (1919, angla, tr. Auld). Fantazia vojaĝo de iama poeto. Libro tre ŝatata de William Auld. 16. Camus: *La fremdulo* (1942, franca, tr. Duc Goninaz). Akcidenta murdo bedaŭras nenion. 17. Capuder: *La vipo kaj la turbo* (1975, slovena, tr. Ošlak). La unua "disidenta" romano en Slovenio traktas amarajn spertojn el 1941-1945. 18. Carroll: *Alico en Mirlando* (1865, angla, tr. Broadribb). Klasika infanlibro verkita de matematikisto. 19. Céline: *Vojaĝo ĝis noktofino* (1932, franca, tr. LeQuint kaj Le Puil). Cinika kaj komika atako kontraŭ patriotismo kaj aliaj ismoj. 20. Cervantes: *La inĝenia hidalgo Don Quijote de la Mancha* (1605-1615, hispana, tr. de Diego). Ĉefverko mondliteratura, moka kaj farsa, iom neologisme tradukita. 21. Chesterton: *La naiveco de pastro Brown* (1911, angla, tr. Bean). Dek du rakontoj pri pastro-detektivo kun metodoj pli intuiciaj ol deduktaj. 22. Conan Doyle: *La ĉashundo de la Baskerviloj* (1902, angla, tr. Auld). Fama aventuro de la rigore racia detektivo Ŝerloko




Holms. 23. Couperus (1863-1923): *Pri vagabondoj kaj friponoj, pri damoj kaj kavaliroj* (nederlanda, tr. Berveling). Noveloj por prezenti la buntan temaron de nederlanda verkisto. 24. Čapek: *Milito kontraŭ salamandroj* (1936, ĉeĥa, tr. Vondroušek). Satira sciencfikcio pri la malkovro, sklavigo kaj ribelo de fremda raso. 25. Ĉehov (1860-1904): *Ĉeriza ĝardeno* (rusa, tr. diversaj). Elektitaj verkoj de eminenta novelisto. 26. Dante: *Infero* (1308-1321, itala, tr. Kalocsay / Dondi). Dondi tradukis ankaŭ la tutan *Dian Komedion*. Klasikaĵo pli legebla, eble, ol vi pensas. 27. Daudet: *Tre mirigaj aventuroj de Tartarin de Taraskono* (1872, franca, tr. Delor kaj Le Brun). Burleskaj aventuroj de provenca fanfaronulo. 28. Dostojevskij: *Krimo kaj puno* (1866, rusa, tr. Parfentjev). Fama kaj influa romano pri studento, kiu murdas lombardistinon. 29. Dumas: *La grafo de Monte-Kristo* (1844, franca, tr. Moirand). Romanego plena de intrigoj, perfidoj, murdoj kaj venĝoj. 30. Eliade: *Fraŭlino Maitreyi* (1933, rumana, tr. Onet). Pri malpermesita amo inter juna eŭropano kaj eĉ pli juna bengalino. 31. Fournier: *La granda Meaulnes* (1913, franca, tr. Bernard). Pri "la verda paradizo de amoj knabnaiva". 32. Frank: *Taglibro de Anne Frank* (1942-1944, nederlanda, tr. Bartels). Taglibro de 13-jara juda knabino, vivanta kaŝite sub nazia okupado. 33. García Lorca: *Cigana romancaro* (1928, hispana, tr. de Diego). Bonega traduko de ŝatata hispana poemaro. 34. García Márquez: *Cent jaroj da soleco* (1967, hispana, tr. de Diego). Populara magirealista romano tradukita en Diegan dialekton. 35. Gárdonyi: *Sklavoj de dio* (1908, hungara, tr. Hamvai). Pri sankta Margareta (1242-1271) kaj la peniga vivo de monaĥoj. 36.



Gogol: *Malvivaj animoj* (1842, rusa, tr. Vyčegjanin). Nova alveninto trompe aĉetadas mortintajn servutulojn. 37. Grimm: *Elektitaj fabeloj* (1812, germana, tr. Bein). Klasika traduko de klasikaj popolfabeloj. 38. Harrison: *Naskiĝo de la rustimuna ŝtalarato* (1985, angla, tr. diversaj). Humura sciencfantazio. Aventuroj de ŝatinda fripono. 39. Hašek: *Aventuroj de la brava soldato Ŝvejk dum la mondmilito* (1923, ĉeĥa, tr. Váňa). Ĉeĥa soldato subfosas la aŭstrian-hungarian armeon per ŝajna



malkompetenteco. 40. Heine (1797-1856): *Kantoj kaj romancoj* (germana, tr. Kalocsay kaj Waringhien). Formfidelaj kaj belaj poemtradukoj en klasika, parnasisma lingvo. 41. Hemingway: *La oldulo kaj la maro* (1951, angla, tr. de Diego). Maljuna kuba fiŝkaptisto luktas kontraŭ giganta fiŝo. 42. Ihara Saikaku: *Kvin virinoj de amo* (1686, japana, tr. Miyamoto). Noveloj pri tragedia amo en la feŭda socio. 43. Jansson: *Muminvalo* (1962, sveda, tr. Bick). Furora infanlibro por ĉiuj aĝoj. 44. Jeluŝić: *Cezaro* (1929, germana, tr. Rotkvić). Historia romano pri la romia imperiestro. 45. Jerome: *Tri homoj en boato* (1889, angla, tr. Badash). Komedia romano, kiu malgraŭ sia aĝo ŝajnas tute moderna. 46. Jiménez: *Platero kaj mi* (1914, hispana, tr. Gutiérrez Adúriz). Andaluza vilaĝo priskribita per dialogoj kun azeno. 47. Kafka: *La metamorfozo* (1915, germana, tr. Nervi). Gregor trovas sin en sia lito transformiĝinta en monstran insekton. 48. Kajjam (1048-1131): *La robaioj* (persa, tr. Waringhien). Versaĵoj kun filozofia enhavo. 49. Kalevala (1849, finna, tr. Leppäkoski). La finna nacia eposo en sorĉa traduko. 50. Kawabata: *Neĝa lando* (1935-1948, japana, tr. Konisi Gaku). Pri amrilato inter tokia riĉulo kaj provinca geĵŝo. 51. Kertész: *Sensorteco* (1975, hungara, tr. Ertl). Kapta kaj profunda rakonto pri juda knabo en Auschwitz kaj Buchenwald. 52. Kiŝon (1924-2005): *Elektitaj satiroj* (hebrea, tr. Ziegler). Tridek humuraj skizoj en simpla kaj klara lingvaĵo. 53. Kivi: *Sep fratoj* (1870, finna, tr. Ekström). Humura romano pri vivo en nordaj praarbaroj en la 19-a jarcento. 54. Lagerlöf: *La mirinda vojaĝo de Nils Holgersson* (1906-1907, sveda, tr. Johansson). Bubo ŝanĝiĝas en koboldon kaj flugas tra Svedio kun anseroj. 55. Laŭ Ŝe: *Kamelo Ŝjangzi* (1936, ĉina, tr. Ŭang Ĉongfang). Pri la tragedia sorto de pekina rikiŝisto. 56. Laxness: *Sendependaj homoj* (1934-1935, islanda, tr. Ragnarsson). Pri la kredoj kaj vivoj de malriĉaj islandaj kamparanoj. 57. Lindgren: *La beleco de Merab* (1983, sveda, tr. Johansson). Deko da noveloj kun nord-sveda fono. 58. Lukiano: *Lukio aŭ azeno* (ĉ. 170, greka, tr. Berveling). La plej malnova teksto en la listo. Humura rakonto pri viro ŝanĝita en azenon. 59. Lusin (1881-1936): *Noveloj* (ĉina, tr. diversaj). Enrigardo al la ĉina socio dum interesa historia periodo. 60. Mann: *La morto en Venecio* (1912, germana, tr. Buinŝters). Germana verkisto iĝas obsedita de juna pola knabo dum ĥolera epidemio. 61. Martinson: *Aniario* (1956, sveda, tr. Auld kaj Nilsson). Eposa poemo pri paneinta kosmovojaĝo. Majstroverko ne sufiĉe konata. 62. Mickiewicz: *Sinjoro Tadeo* (1834, pola, tr. Grabowski). Klasika traduko de la pola nacia eposo. 63. Milne: *Winnie-la-Pu* (1926, angla, red. Tonkin). Klasika infanlibro bele esperantigita. 64. Miyazawa Kenzi (1896-1933): *Gooŝ la ĉelisto* (japana, tr. Nozima). Fantaziaj noveloj kaj fabeloj. 65. Mori (1862-1922): *Rakontoj de Oogai* (japana, tr. diversaj). Kvar noveloj. 66. Nothomb: *Higieno de l' murdisto* (1992, franca, tr. LeQuint kaj Le Puil). Ĵurnalistino intervjuas mortontan mizantropen verkiston. 67. Orwell: *Mil naŭcent okdek kvar* (1949, angla). Klasikaĵo pri totalisma socio, laŭdire jam dufoje esperantigita. 68. Orzeszko: *Marta* (1872, pola, tr. Zamenhof). Pri junulino luktanta por digna vivo. 69. Poe: *La falo de la domo Usher* (1839, angla, tr. Grimley Evans). Simbolisma hororo pri ĝemela fratino entombigita vivanta. 70. Prus: *La faraono* (1895, pola, tr. Bein). Historia romano pri la antikva Egiptio. 71. Puŝkin: *Eŭgeno Onegin* (1825-1837, rusa, tr. Valentin Melnikov). Versromano, kvazaŭ "enciklopedio de la



rusa vivo". 72. Queneau: *Stilekzercoj* (1947, franca, tr. Ertl). Naŭdek naŭ diversstilaj raportoj pri la sama okazaĵo. 73. Radiguet: *Kun Diabla en la korpo* (1923, franca, tr. Duc Goninaz). Eleganta amromano pri rilato inter edzino kaj 16-jara knabo. 74. Ramos: *Vivoj sekaj* (1938, portugala, tr. Knoedt). Batalo de malriĉa familio kontraŭ sekeco kaj malsato en nordorienta Brazilo. 75. Remarque: *En okcidento nenio nova* (1929, germana, tr. diversaj). Pri la suferado de soldatoj en la mondmilito. 76. *Sagao de Njal* (ĉ. 1250, islanda, tr. Ragnarsson). La plej elstara islanda sagao, pri eventoj inter 960 kaj 1020. 77. Saint-Exupéry: *La eta princo* (1943, franca, tr. Delaire). Fabela rakonto ne nur por infanoj. 78. Saki (1870-1916): *La lupino kaj aliaj rakontoj* (angla, tr. Grimley Evans). Spritaj kaj satiraj rakontoj en eleganta stilo. 79. San-Antonio: *La maljunulino kiu paŝis en la maro* (1988, franca, tr. LeQuint kaj Le Puil). Maljuna aventuristino elektas heredanton kaj instruas lin pri ŝtelarto. 80. Sartre: *La naŭzo* (1938, franca, tr. Bernard). Ŝlosila verko de ekzistismo. Tridek-jara historiisto naŭziĝas pri sia vivo. 81. Schnitzler: *Sonĝonovelo* (1926, germana, tr. Duc Goninaz). Sonĝeca erotika rakonto aluda al la sonĝinterpretado de Freŭdo. 82. Selimović: *La derviŝo kaj la morto* (1966, serbokroata, tr. Imbert). Religiuo en Bosnio dum la turka regado jetiĝas en politikan potenclukton. 83. Shakespeare: *Hamleto, reĝido de Danujo* (ĉ. 1600, angla, tr. Zamenhof). La unua esperantigo de Ŝekspiro, kaj ankoraŭ leginda. 84. Shi: *Ĉe akvorando* (ĉ. 1370, ĉina, tr. Laŭlum). Romanego pri kamparana ribelo ĉirkaŭ 1120. 85. Sienkiewicz: *Quo vadis?* (1895, pola, tr. Lidja Zamenhof). Historia romano pri Romo sub Nerono. 86. Simenon: *La flava hundo* (1931, franca, tr. Luez). Unu el pluraj krimromanoj pri komisaro Maigret jam esperantigitaj. 87. Stevenson: *D-ro Jekyll kaj s-ro Hyde* (1886, angla, tr. Goodheir / de Diego). Elektu el du tradukoj de rakonto pri apartigo de la du flankoj de unu persono. 88. Strindberg: *Insulanoj de Hemsö* (1887, sveda, tr. Johansson). Pri la rilatoj amaj kaj geedzaj inter homoj malsamklasaj. 89. Tagore (1861-1941): *Malsata ŝtono* (bengala, tr. Sinha). Sep rakontoj spegulantaj la morojn kaj homtipojn bengalajn. 90. Tammsaare: *La mastro de Kõrboja* (1922, estona, tr. Kärt). Juna bienestrino provas edzigi al si filon de apuda bienulo. 91. Tolkien: *La Mastro de l' Ringoj* (1954-1955, angla, tr. Auld). Popularega trivoluma fantazia romano. 92. Tolstoj: *Resurekto* (1899, rusa, tr. Sapojnikov). Pri la maljusteco de leĝoj kaj la hipokriteco de la eklezio. 93. *Tragedio en la universo* (1961, kroatiserba, tr. Rotkvić). Kolektiva verko de junaj astronomoj. Eksterteranoj vizitas la detruitan Teron. 94. Turgenev: *Patroj kaj filoj* (1862, rusa, tr. Bein). Pri diferencoj inter generacioj en la tempo de la fino de servuteco. 95. Vazov: *Sub la jugo* (1889, bulgara, tr. diversaj). Historia dramo pri luktado kontraŭ turka regado ĉirkaŭ 1875. 96. Vermeulen: *La migranta judo* (1906, nederlanda, tr. Declerck). Rakonto el la tempo de Kristo. 97. Verne: *Ĉirkaŭ la mondo dum okdek tagoj* (1873, franca, tr. Tortel). Ŝatata romano pri aventura vojaĝo. 98. Voltaire: *Tri verkoj de Volter* (1747-1767, franca, tr. Lanti). Tri gravaj verkoj en unu volumo: *Kandid; Zadig; Senartifikulo*. 99. Wells: *La dormanto vekigita* (1910, angla, tr. Milward). Post 203-jara dormo, viro vekigita en socio por li fremda. 100. Zweig: *Brulanta sekreto kaj aliaj rakontoj* (1911, germana, tr. Schwerin). Dekdujara knabo intervenas kontraŭ la amanto de lia patrino.

Malgraŭ kontrolo kaj komparo kun aliaj kalendaroj ne eblas garantii la fidindecon de ĉiuj informoj en la kalendaro, pri kiuj respondecas nur la organizantoj. La venonta kalendaro aperos en la aprila numero.

novembro:

06-07: 11-a Esperanto-Kongreso en Ĉugoku kaj Ŝikoku en Higasiakagawa-si, Japanio. ✉ kosaka_kiyoyuki@hotmail.com.

11-14: GRUPE-14, Glivice'a Rendevuo de Uzantoj kaj Praktikantoj de Esperanto en Pollando. Prelegoj, teatraĵoj, filmoj, komuna kantado, vizito de la famaj radiostacio kaj kasteleto de la dinastio Piast. ✉ Esperanto, skr. poczt. 21, PL-44-101 Gliwice, Pollando. ☎ +48 660 427 967. ✉ www.esperanto.cba.pl, stanislaw.mandrak@gmail.com.



12-14: Semajnfinaĵ E-kursoj en pluraj niveloj en Herzberg, Germanio. ✉ Interkultura Centro, Grubenhagenstr. 6/8, DE-37412 Herzberg, Germanio. ✉ www.ic-herzberg.de, esperanto-zentrum@web.de.

12-14: 22-a Eŭropa Rendevuo en la urbo Stella-Plage (apud Le Touquet), Francio. La plej grava internacia semajnfino en Francio, norde de Parizo. 5 diversnivelaĵoj kursoj. Koncerto de Kajto kaj Lingvo-Festivalo. ✉ 22 rue d'Arras, FR-62123 Simencourt, Francio. ✉ <http://esperanto.nord.online.fr/fr/index.htm>, aplutniak@esperanto-nord.org.

18-21: KAEST 2010 (Konferenco Aplikoj de Esperanto en Scienco kaj Tekniko) en Modra-Harmónia, Slovakio, 30 km de Bratislava, en edukcentro de la Komenio-universitato. La temo: "Modernaj teknologioj por Esperanto". Ĝuu prelegojn, prezentojn, diskuto pri scienco kaj tekniko, praktike ekzercu, utiligu novakiritajn sciojn. ✉ Peter Baláž, Vitazná 840/67-A, SK-958 04 Partizánske, Slovakio. ✉ www.ikso.net/kaest, kaest@ikso.net, la edukcentro: www.modra.cdvuk.sk.

19-21: Studosemajnfino en Wijk aan Zee, Nederlando. Esperanto Nederland okazigos ĝin por ĉiu aĝo kaj en ĉiu nivelo. ✉ www.esperanto-nederland.nl/ned/index.php, studosemajnfino@esperanto-nederland.nl.

27: 33-a Malferma Tago de la Centra Oficejo de UEA en Roterdamo, Nederlando. Prelegoj, filmoj, libroprezentoj k.a. En la libroservo ĉio rabatita. ✉ (vidu la kolofonon kaj p. 235, aŭ la int. kovrilon).

decembro:

04: Marcipana Kristnasko en Esperanto-Muzeo en Svitavy, Ĉeĥio. Ŝatata ateliero, dum kiu vi povos lerni kiel krei kristnaskajn kaj novjarajn figuretojn el marcipano. Eblo viziti ev. adventan programon en urbe. ✉ dvor.libuse@seznam.cz.

10-12: 48-a Studadesio en Herzberg, Germanio. Klerigsemajnfino por interesigantoj pri historio, literaturo, interlingvistiko. Por studemuloj, kiuj kolektas studpoentojn, ĝi kalkuliĝas kiel klerigmodulo por fariĝi kursgvidanto, instruanto. ✉ (v. 12 nov).

10-12: XI-aj Bjalistokaj Zamenhof-Tagoj en Bjalystok, Pollando. Prelegoj, teatraĵoj, pikniko. ✉ Bjalistoka E-Societo, p.k. 67, Bjalystok 1, Pollando. ✉ www.espero.bialystok.pl.

11: AnkRo – Antaŭkristnaska renkontiĝo en Písek, Ĉeĥio. ✉ pisek@esperanto.cz.

18-20: 29-a Komuna Seminario (KS) en Hanojo, Vjetnamio. La ĉefa temo "Komunikiloj inter junaj esperantistoj". ✉ Nguyen Hoang Yen, ☎ (084) 1663420560. ✉ keanu_magdark@yahoo.com.

27 dec – 03 jan: 27-a IF, Internacia Festivalo en Nördlingen, Germanio. La tradicia aranĝo por familioj kaj plenkreskuloj. Kadra temo: "Lingvoj". Tuttaga ekskurso al Munkeno, la ĉefurbo de Bavario. ✉ Hans-Dieter Platz (HDP), Postfach 1148, DE-34303 Nidenstein, Germanio. ☎/✉ +49 56248007. ☎ +49 1714964558. ✉ www.internacia-festivalo.de; hdp@internacia-festivalo.de.

27 dec – 03 jan: Junulara Esperanta Semajno, JES en Burg ĉe la rivero Spree, Germanio. Junulara silvestra renkontiĝo por la novjaro (antaŭe AS kaj IS). ✉ <http://jes.pej.pl/2010/>, lukiz@pej.pl, juliahell@hotmail.com.

27 dec – 03 jan: 9-a Novjara Renkontiĝo (NR) en Saarbrücken, Germanio. Por infanoj, familioj kaj plenkreskuloj. Ĉ. 150 partoprenantoj el deko da landoj. Prelegoj, koncerto, teatraĵo, ekskursoj. Lingvokursoj por komencantoj, konversacio. ✉ EsperantoLand e. V., Lu Wunsch-Rolshoven, Wiclefstr. 9, 2. Gartenhaus, DE-10551 Berlin, Germanio. ✉ www.esperantoland.org/nr, lu.esperantoland@gmx.de.

28 dec – 02 jan: SANO-1: Saneco, Alternativo, Novjaro en Herzberg am Harz, Germanio. Jarfina feriumado kun programeroj pri sano, alternativa vivmaniero, bonsento. Ekskursoj, turismaj vizitindajoj, sportoj, kulturaj ofertoj. ✉ (v. 12 nov).



januaro:

09-12: 6-a Internacia Esperanto-Renkontiĝo de Meditado en Seulo, Koreio. Meditado, prezento de korea kulturo, Esperanto-kulturo pere de Esperanto. ✉ Esperantista Asocio de Ŭonbulismo. Seula Esperanto-Kulturcentro, 12-3, Dongbuk B/D 2-ga Choongmuro Chungku, Seulo, Koreio. ✉ www.esperanto.co.kr, esperanto@saluton.net.

14-16: 'Ni festivalu!' kaj 'Drondo'. Semajnfina aranĝo en Barlastono, Britio. Staĝo pri Esperanta teatro kaj diskutrondo (por progresintoj) pri diversaj temoj. ✉ Esperanto-Domo, Station Road, Barlaston, Staffordshire, DT12 9DE, Britio. ☎ +44-(0)1782-372141. ✉ eab@esperanto-gh.org.

29-31: Nacia kongreso de Nov-Zelanda Esperanto-Asocio en Wellington, Nov-Zelando. ✉ www.esperanto.org.nz, nzea@esperanto.org.nz.

februaro:

02 feb – 30 mar: Internacia Studumo pri Turismo kaj Kulturo en Bydgoszcz, Pollando. Kurso pri turismo, kulturo, Esperanto kaj pola lingvo, realigitaj kune kun Universitato Kazimiro la Granda (UKW) en Bydgoszcz. ✉ Klreigejo de AIS, ul. M. Skłodowskiej-Curie 10, PL-85-094 Bydgoszcz, Pollando. ☎/✉ +48 523461151. ✉ stud-esperanto@wp.pl, stud@esperanto.bydgoszcz.eu.



29 feb – 05 mar: Mediteranea Esperanto-Semajno 2011 en Agay, lazura marbordo, Francio. Kursoj, ekskursoj, ripozo, distriĝoj. ✉ Monique Prezioso, 92 allée des Harkis, FR-83700 Saint-Raphaël, Francio. ☎ +33 (0)494830688. ✉ www.esperanto-angers.fr, prezmoni@hotmail.com.

29 feb – 09 mar: 9-a Internacia Himalaja Renkontiĝo en Katmanduo, Nepalo. ✉ Hori Jasuo, 10-27 Simosinden Maevasi Gunma, JP-371-0822 Japanio. ✉ horizonto@water.sannet.ne.jp.

marto:

02-06: Bibliaj Tagoj en Werl ĉe Dortmund, Germanio. Prelegoj pri la Biblio kaj diservoj kun Adoru, la

ekumena preĝ- kaj kantlibro. ✉ Stefan Lepping, Mellinstr. 5, DE-59457 Werl, Germanio.

aprilo:

08-10: 92-a Brita Kongreso de Esperanto en Eastbourne, Britio. Kongresa temo: Lumturoj, lumuloj kaj lumajoj. ✉ (vidu 14 jan). ☐ www.esperanto-gb.org/eab/eab_events/bk2011_payment.htm.

18-23: IEK 11, Internacia Esperanto-Konferenco en Wuhan, Ĉinio. Kun antaŭkonferenco en Pekino. La traktota temo: "La ĉina saĝo". ☐ <http://osiek.org/index.php>, OSIEK kasisto@osiek.org.

22-26: Interasocia Renkontiĝo de Esperanto ĉe Mediteraneo en Seto, Francio. Kunorganizita de SAT-Amikaro, Espéranto-France kaj pluraj societoj. ✉ LOKO, 13bis rue Haute, FR-30310 Vergèze, Francio. ☐ info@esperantosete2011.fr, <http://esperantosete2011.fr>.

22-29: Printempa Semajno Internacia (PSI) en Waldfischbach-Burgalben, Germanio. La paska aranĝo por la tuta familio. ☐ <http://www.esperanto.de/psi>, psi@esperanto.de.

29 apr – 09 maj: 23-a Aroma Jalto en Jalto, Ukrainio. E-festivalo kies celo estas plialtigi la lingvonivelon de la partoprenantoj kaj konatigi ilin kun la belega naturo de Krimeo. ✉ Volodimir Hordijenko, p/k 35, UA-01133 Kiev, Ukrainio. ☐ www.aromajalto.ukrainio.org.ua, volodomir@ukr.net.

30 apr – 07 maj: 32-a Tutpollanda Esperanto-Kongreso en Nowy Sącz, Pollando. La temo: Civitana aktiveco de esperantistoj. ✉ Ĉefa estraro de PEA, Aleja Wolności 37 F 7, PL-33-300 Nowy Sącz, Pollando. ☐ korlando@o2.pl.

majo:

07-14: Kongreso de esperantistaj fervojistoj, la 63-a kongreso de IFEF, en la ĉeĥa urbo Liberec. ☐ www.ifef.wz.cz, ladislav.kovar@tiscali.cz.

21-23: 8-a MEKARO – Mez-Kanada Renkontiĝo de Esperanto en Kingston, Ontario, Kanado. Turisma amikeca semajnfino, vizitoj kaj komunaj manĝoj en restoracioj. ✉ Esperanto-Klubo de Kingstono kun Esperanto-Societo Kebekia, 6358 de Bordeaux, Montréal, Québec, Kanado, H2G 2R8. ☐ www.esperanto.qc.ca, informo@esperanto.qc.ca.

junio:

01-05: Printempa BARo 2011 en Bad Münden inter Hannover kaj Hameln, Germanio. En la arbaro, tial ideala por familioj kun etaj infanoj. ✉ Andi Münchow, Oberstraße 15, DE-30167 Hannover, Germanio. ☐ www.krokodilo.de/baro/baro.php, andim@gmx.li.

29 jun – 05jul: 1-a Internacia Esperanto-Semajno, IES-1 en ĉefurbo Erevano kaj en arbara ripozejo Tsakhkadzor, Armenio. Venu kaj malkovru la antikvan Armenion kaj la biblian monton Ararato. ☐ www.area.am (aranĝoj); ies-1.armenio@area.am, susanna.baghdasaryan@yahoo.com.

julio:

03-10: Internacia Junulara Lingvotendaro, IJL en Jászberény, Hungario. Matene lernado, posttagmeze ekskursoj kaj plaĝumado. ☐ hferenc@pr.hu.

09-14: 8-a TAKE, Tutamerika Kongreso de Esperanto en São Paulo, Brazilo. Samtempe kaj samloke Brazila Kongreso de Esperanto kaj kongreso de Brazila Esperantista Junulara Organizo. ☐ www.easp.org.br/kongreso, sudastelaro@gmail.com.

09-16: 47-aj Baltiaj Esperanto-Tagoj (BET-47) en Priekulj (Ĉesu distrikto). Temo: "Latva folkloro dum jarcentoj". ☐ www.esperanto.lt, margarita.elve@gmail.com.

09-17: Jubilea kongreso de Aŭstralia Esperanto-Asocio en Adelajdo. Temo: "100 jaroj de Esperanto en Aŭstralio. Kaj nun?" Prelegoj: H.Tonkin, T. Steele kaj aliaj. Koncerto de JoMo, teatra kaj kanta konkursoj, ekskursoj. ☐ <http://aea2011kongreso.ning.com>; www.sa.esperanto.org.au.

12-16: Internacia natur-amika renkontiĝo: Miraklo de duno kaj aer-miraĝo. En Suda Gobio, Mongolio. Renkontiĝo en la suda parto de Mongolio, por ekkoni la viv-kutimojn de kamelbredistoj kaj ĉevalistoj. ✉ Batzaya, P. O. Box 57, NM-10646 Ulaanbaatar, Mongolio. ☐ batzaya@rambler.ru.

14-21: 67-a Internacia Junulara Kongreso, IJK en Hlibivka apud Kievo, Ukrainio, ĉe la plej granda akvorezervejo de Eŭropo. ✉ Ukraina Ligo de Esperantista Junularo kaj TEJO, Mikaelo Lineckij. ☎ +38 (044) 2231255, ☎ +38 (063) 8493193. ☐ www.ijk-67.retejo.info/, ijk-67@ukr.net.

17-23: 44-a ILEI-Konferenco en Kopenhago, Danio. (v. p. 222).

23-30: 96-a Universala Kongreso de Esperanto en Kopenhago, Danio (vidu p. 222).

30 jul – 06 aŭg: 4-a INA-Konferenco en Herzberg am Harz, Germanio. La signifo de naturkuracado en la nuna mondo. Prelegoj pri naturkuracado, praktikaj spertoj. ✉ Internacia Naturkuraca Asocio (INA), Harald Schicke, Hauptstr. 38, DE-37412 Herzberg am Harz, Germanio. ☐ info@ginseng-laden.de, www.ina-asocio.info.

30 jul – 06 aŭg: 84-a SAT-Kongreso en Sarajevo, Bosnio kaj Hercegovino. ✉ 84-a SAT-Kongreso, Kralja Tvrtka 19, BA-71000 Sarajevo, Bosnio kaj Hercegovino. ☎/☐ +387-33-205487. ☐ www.satesperanto.org, satkongreso@esperanto.ba.

aŭgusto:

02-09: 61-a Kongreso de Kristana Esperanto-Ligo, KELI, en Poděbrady, Ĉeĥio. ✉ Pavel Polnický, Na Vinici 110/10, CZ-290 01 Poděbrady, Ĉeĥio. ☐ ceapolnický@quick.cz.

15-19: 51-a 'Somera Festivalo' – Kunludo kaj kunstudu en Barlastono, Britio. Du-nivela kursaro kun la eblo turismi aŭ private studi / esplori en la Biblioteko Butler. ✉ (v. 14 jan).

20-27: Itala Kongreso en Torino, Italio. La temo: "Kaj nun ni estu Eŭropanoj!" ☐ itala.kongreso@gmail.com. Videoj: Torino, pasia urbo: <http://vimeo.com/14586979>. Torino, historia urbo: <http://vimeo.com/14587971>.

septembro:

11: 10-a Spiritisma Esperanta Renkontiĝo en Rio de Janeiro, Brazilo. ✉ Esperanto Grupo Lázaro Luiz Zamenhof, Strato Abílio dos Santos 137, Bento Ribeiro, BR-21331-290 Rio de Janeiro, Brazilo. ☐ contato@lazaroluizzamenhof.com.br.

oktobro:

07-11: Komuna Esperanto-Kongreso de Japanio kaj Koreio apud Seulo en Koreio. La temo "Esperanta amikeco kaj interkompreniĝo trans la maro". ☐ http://jei.or.jp/evento/2011/kk_jek11s@jei.or.jp.

20-23: Rusia Esperanto-Kongreso, REK-27 en Ĉeboksari, Rusio. Pliaj informoj ☐ www.reu.ru/index.php?evento=REK-27, kongreso@reu.ru.

20-23: Internacia Lingva Festivalo 2011 en Ĉeboksari, Rusio. Tradicia aranĝo organizata de esperantistoj por neesperantistoj kaj traktanta lingvajn temojn. ☐ www.lingvafestivalo.org, al.blinov@gmail.com.

21-23: 'Course-You-Can', Barlastono, Britio. Kurso ĉefe por anglalingvaj komencantoj / komencintoj (okazos samtempe kun 'Drondo' – spertuloj kunvenigu nespertulojn!). ✉ (vidu 14 jan).

21-23: 'Drondo', Barlastono, Britio. Semajnfina Esperant-lingva diskutrondo pri diversaj temoj (okazos samtempe kun 'Course-You-Can' - spertuloj kunvenigu nespertulojn!). ✉ (vidu 14 jan).



januaro:

13-15: 'Ni festivalu!' kaj 'Drondo'. Semajnfina aranĝo en Barlastono, Britio. Staĝo pri Esperanta teatro kaj diskutrondo (por progresintoj) pri diversaj temoj. ✉ (vidu 14 jan 2011).

majo:

16-20: Printempa BARo 2012 en Bad Münden inter Hannover kaj Hameln, Germanio. En la arbaro, tial ideala por familioj kun etaj infanoj. ✉ (v. 01 jun 2011).

19-21: 9-a MEKARO – Mez-Kanada Renkontiĝo de Esperanto en Kebeko, Kanado. Turisma amikeca semajnfino. Vizitoj kaj komunaj manĝoj en restoracioj. ✉ Esperanto-Societo Kebekia, 6358 de Bordeaux, Montréal, Québec, Kanado, H2G 2R8. ☐ informo@esperanto.qc.ca.

julio:

97-a Universala Kongreso de Esperanto en Hanojo, Vjetnamio.

Novembraj novaĵoj pri la E-programoj de publikaj radiostacioj

La ĉi-jara renkontiĝo de la amikoj de la E-radiofonio dum la Universala Kongreso de Esperanto en Havano speguliĝis ne sole sur la paĝoj de la revuo *Esperanto* en la septembra numero. Du ampleksaj raportoj pri tiu eksterordinare riĉenhava kunsido sonraporte aŭdiĝis aldone en la programoj de la E-Redakcio de Pola Radio www.polskieradio.pl/eo la 24-an de septembro kaj la 1-an de oktobro 2010. Interesiĝantoj povas peti la ligoadresojn ĉe la adreso esperanto@polskieradio.pl aŭ ĉe barbarinella@gmail.com.



Krom tiu ĉi raporto en la postkongresa periodo Pola Radio disaŭdigis kelkajn aliajn raportojn dokumentantajn la evoluon de la Havano UK 2010. Kelkajn videointervuojn registritajn dum la lasta UK disponigas sur siaj paĝoj Ĉina Radio Internacia: <http://esperanto.cri.cn/581/2010/07/14/Zt1s113894.htm>. Interesajn kongresajn sondokumentojn pretigis krome Radio Aktiva: www.ameriko.org/eo/radioaktiva. Kiel rimarkigas multaj aŭskultantoj, la raportoj de la unuopaj radioredakcioj kaj podkasto kune kun la dumkongresa raportado de Radio Havano: www.ameriko.org/radiokubo bone kompletigis la ĝeneralan bildon de la ĉi-jara UK. Do ili ĉiuj bone servis al la interna informado de la tuta E-komunumo.

Aldonendas, ke ĉe la pagaro de la Amerika Komisiono de UEA krom programoj de Radio Havano kaj Radio Aktiva estas elŝuteblaj ankaŭ podkasto de Parolu Mondo: <http://parolumondo.com/>. Lastmomenta informo, ke meze de oktobro ni sojlas la komenciĝon de nova podkasto el la Suda Ameriko, nome Panama Radio, kies adreso jenas: <http://panamaradio.org>, kio signifas, ke la sudamerika kontinento akiras fortan lokon en la E-radiofonio.

Samtempe ne eblas forgesi pri la daŭra aktivado de la loka radiostacio en Rio-de-Ĵaneiro, Brazilo, emisianta ĉiusemajne la programon "Esperanto, a Língua da Fraternidade".

Maloftas informoj pri lokaj radiostacioj, en kies atento troviĝas i.a. Esperanto. Tial koninda estas la

programo "Les langues se délient", kiun pretigas membroj de du najbaraj kluboj en la lokoj Châtillon-sur-Chalaronne kaj Bourg-en-Bresse, Francio. En la semajna ciklo alternas elsendoj pri Esperanto kaj pri la lingvo de la regiono "la Bresse". Jen aŭdiĝas Esperanto, jen "la Bresse", kiujn akompanas evidente ĉiukaze la franca lingvo. Ĉiu 12-minuta elsendo estas dissendata du fojojn ĉiusemajne de du lokaj radiostacioj: Radio Tropikoj kaj Radio Kristana Francio. Ili estas aŭskulteblaj ankaŭ per la Interreto: <http://sites.google.com/a/chatillon-sur-chalaronne.net/esperanto-chatillon/Home/emission-de-radio>. Pri la programo respondas i.a. Pierre Thévenard.

Se la ĵus menciitaj programoj celas unuavice la nacilingvan publikon, la E-komunumo ricevas aktualajn informojn ankaŭ pere de: Radio Vatikana: www.radiovaticana.org/it1/on_demand.asp?gr=esp, Radio 3ZZ de Melbourne: <http://www.3zzz.com.au/staging/programs.aspx>, Varsovia Vento: www.viavento.republika.pl/aktuale/sonmaterialoj.htm, La Ondo de Esperanto: <http://la-ondo.rpod.ru> kaj Radio Verda: <http://radioverda.co>.

Gravas kompreneble ne nur aŭskulti tiujn programojn, sed ankaŭ reagi al ili kaj laŭeble kontribui. Sendube al la plej ĝojigaj informoj apartenas tiu, ke post kelkmonata paŭzo en la E-programoj de la Pola Radio denove aperis pli da aktualaj kaj ĝisdataj sondokumentoj. Samtempe la facebook-Amikaro de Pola Radio en Esperanto meze de oktobro havis ĉ. 1030 membrojn: www.facebook.com/group.php?gid=326997163456.

Poiome la historion eniras la radiaj programoj emisiataj per mez- kaj mallongaj ondoj, eĉ se iujn E-programojn daŭre eblas aŭskulti ankaŭ helpe de ili. Ne falas tamen en la forgeson homoj, kiuj grave kontribuis al la evoluo de la E-radiofonio en la epoko, kiam ne eblis ankoraŭ paroli pri satelitaj kaj interretaj programoj. Neforviŝeblan lokon en tiu historio havas la Svisa Radio Internacia kaj Artur Baur. La informo pri lia morto, veninta en septembro, ĉagrenis ĉiujn amikojn de la E-radiofonio, sed ankaŭ memorigis lin kiel elstaran kontribuanton al la evoluo de la ĉiutaga lingvomedio, kiu pli ol 40 jarojn gvidis la E-elsendojn de SRI.

Gabi Kosiarska

La Sankta Biblio

Ni proponas senpagan

Biblian Studkurson

Kursanoj senpage ricevos

Esperantan Biblion

*"Li juĝos inter la nacioj
... kaj ili forĝos el siaj
glavoĵoj plugilojn...
oni ne plu lernos militon."*

Jesaja 2:4

david.budden@gmail.com

Internacia Biblio-Misio
50 Wissage Road,
LICHFIELD
WS13 6SW. Anglio.

Elstara libro al elstara homo

La arto labori kune. Festlibro por Humphrey Tonkin. Red. Detlev Blanke kaj Ulrich Lins. Rotterdam: UEA, 2010. 901p. 26cm. Bind. Ilus. ISBN 9789290171133. Prezo: € 60,00

Ne nur unu haro de naŭ bovoj

Sekcioj VII-X (p. 585-876)

Ĉu ekzistas libro esperantlingva pli dika ol tiu ĉi? Kaj volumo kies titolon enestas pli da kaŝitaj sencoj? (Vidu la apudan skatolon kun mia frivola post-omaĝeto.) La kvanto certe honoras la omaĝaton, ĉu ankaŭ la kvalito? Mi esploru tion trafolumante la sekciojn VII-X; la trian parton de la volumo, kiu restas al mi post la laboro de miaj kunrecenzantoj Shlafer kaj Gobbo.

Fortika kaj kvalita

Ni komencu per la materia flanko: malgraŭ la detabla falo kaj mia dorsosaka kunporto de la libro, la fortika bindo bonege eltenas. La okulojn plezurigas bele dezajnita paĝaro, kun agrablaj tekstokorpo kaj marĝeno. Da preseraroj troviĝas statistike neglektebla aro. Tamen, iom amuze: „esperperantistoj” (p. 868, l. -9); ni notu kelklokan malaperon de spacoj intervortaj (ekz. „provincoViktorio”, p. 868, al. 4., lasta l.) kaj postkomaj (ekz. „patrino,dommastrino”, p. 868, al. 3., l. 1). Ĝenerale, la lingva kvalito estis atentata: mi notis nur iun misuzon de *komenciĝi* anst. *komenci* (kontraŭ unu internacia respondkuponon mi diros sur kiu paĝo).

Natura lingvomedio

Ĉapitron post ĉapitro, mia paŝtiĝo komenciĝas sur la promesaj herbejoj de „Apliko kaj disvastigo”, temo kiu ŝajnas ampleksi duonon de la strategiaj prioritatoj de UEA. Nu, temas pri kontribuoj kies temo rilatas, por diri per sinonimo, al „faka agado”, ekde instruado ĝis informadiko. La instru-sperta Radojica Petrović panoramas, de Lingva Prismo tra lernu.net ĝis Lingvolanĉilo, edukprojektojn pri kaj por diverseco en kiuj Esperanto rolas, atentigante ke ĉiam necesas konsideri ankaŭ la internan diversecon de Esperantujo. La ĉefmotoro de edukado.net (82 748 vizitoj en la jaro 2008!), Katalin Kováts, prezentas la celojn, historion, kunlaborantojn kaj atingojn de tiu porinstruista retejo, malkaŝante eĉ sekretojn de la sukceso: temas pri informrimedaro kiu „en tiom kompleksa formo” eĉ „en nacilingvaj eduksistemoj ne disponeblas”. Stefan MacGill elmontras ke la flekseblo de nia lingvo ebligas ke didaktikistoj



fiksu lernoŝtupojn kun granda vari-libero, malpli ortodokse ol ĉe etnaj lingvoj; sed avertas ke ni devas aparte atenti specifajn malfacilojn kiel transitiveco kaj -ig/-iĝ. Imre Ferenczy kaj István Gulyás kompendias la centjaran historion de la esperantista agado medicina resp. fervojista, kun forta emfazo, ĉe la dua, pri la agadoj terminologia kaj fakaplika. La institucian flankon de faka aplikado prilumas Petro Chrdle kaj Amri Wandel, kronikante respektive la ekzemplodonan historion de la scienca-teknika aranĝo SAEST/KAEST (ekde 1978) kaj de la Internacia Kongresa Universitato. Barbara Pietrzak ilustras

kiusence radio-elsendoj signifas „naturan lingvomedion” por Esperanto, ekde la kvalit-salta ekfunkcio de Pola Radio en 1959 ĝis la nuna epoko de interretaj podkasto; per analizo de korespondaĵoj ŝi montras la varian rolon kiun ludas la polaj elsendoj por diverslandaj esperantistoj. Inform-fakulo Thomas Bormann statistikas pri la preskaŭa neĉeesto de Esperanto kiel temo en raportoj de novaĵagentejoj kaj konkludas ke pli celtrafas koncentri niajn fortojn al informado loknivele. Reinhard Fössmeier ilustras problemojn de komputila internaciigo – eĉ piktogramo de rubujo ne ĉie samas, pro kulturaj malsamoj. Mauro La Torre, forpasinta kelkajn semajnojn post la apero de ĉi tiu libro, pristudas la rekoneblecon de frazeologiaĵoj per komputila analizo. Victor Sadler priskribas unu aspekton de la angla-Esperanta traduksistemo TRUKILO, „rezulto de ĉ. 8500 horoj da laboro”, kaj heredanto de spertoj el la fama projekto Distribuita Lingvo-Tradukado. Toon Witkam pripensas la sekvojn de novaj teknologioj, el kiuj povas rezulti, paradokse, eĉ „prospera mondo, en kiu la plejmulto estas analfabetoj”.

Pli ol unu haro de naŭ bovoj

Ĉekape de la sekcio Literaturo, Probal Dasgupta donas malpli da motivoj ol kutime por plendi pri densa stilo: ni lernas de li kiel Esperanto rilatu al la „postnacia literatura entrepreno”, forkreskante de vitrina elmontrado de apudmetitaj naciaj kultureroj, enkreskante postnacion scenejon kie ĝi plene plenumu sian funkcion kiel „kvintesenca traduka lingvo”. Trevor Steele elmetas siajn personajn motivojn verkadi, samtempe fascinate de historioj kaj de vortoj. Paul Gubbins prezentas „sub la spoto” la historion de originala teatrado en Esperanto, specife atentante la strangaĵon ke E-dramoj malmulte ligiĝas al la „verda” fono socia kaj kultura el kiu ili

elkreskas. Esperantan Ŝekspiron oni atendu, laŭ li, nur post paso de mil jaroj... Georgi Mihalkov analizas la novelaron *La granda aventuro* de Szilágyi – cetere, trafante la koincidon ke fine de 2009 aperis grand-merkata hispana traduko de la tiulibra *La liberiĝo de la juĝisto*. Baldur Ragnarsson pravas, per riĉa ilustra materialo, la altan kvaliton de la Ŝekspir-tradukoj de Tonkin, kiuj baziĝas sur la principo „fidele redoni la spiriton... en kazoj de dubo, trakti kun la veraj poetoj”. Anna Löwenstein klarigas kial Tonkin interesiĝis pri Tolkien, t.e. kiajn literaturajn valorojn portas la ofte subtaksata *La mastro de l' ringoj*. Roman Dobrzyński ĉiĉeronas nin tra la enhavo, historio kaj fono de la kvintesenca pola verko *Sinjoro Tadeo*, tra la vivo de la aŭtoro Adam Mickiewicz, sed detale traktas ankaŭ la legendan esperantigon de Grabowski kaj la spektindan filmigon de Andrzej Wajda. La dojeno de ĉina esperantismo, Laŭlum, kompendias la ĉinan klasikan beletron en Esperanto: la vastecon de lia temkampo montras ke la E-tradukoj de klasikaj ĉinaj verkoj ampleksas jam 7000 paĝojn, sed ke tio egalas, laŭ ĉina diro, al „nur unu haro de naŭ bovoj”. Duncan Charters alojas siajn engaĝojn beletran kaj pedagogian, analizante la motivojn legi literaturon ĝenerale kaj en Esperanto specife.

Sekcio pri defioj

Kun nur ses kontribuoj, la sekcio pri Strategio unuavide ŝajnas magra, sed tion la kvalito de la eroj riĉe kompensas. Nur 30 jarojn aĝa, Peter Baláž parolas jam el vasta propra sperto, resumante tre mature la kondiĉojn sub kiuj nia movado sukcesos adaptiĝi al la postuloj de la 21-a jarcento: la kapvortoj por tio estas moderniĝo, profesiiĝo, malfermiteco, ĉiuflankeco, bunteco kaj kunlaboro. Se tiuj pozitivajoj sonus malplene, legindas kiuj konkretaj spertoj subtenas ilin, ekde la DVD-o *Esperanto elektronike* ĝis la filmo *Esperanto estas...* Miroslav Malovec alfrontas unu specifan aspekton de tiu adapta moderniĝo, la demandon pri virtualaj bibliotekoj: temo aparte grava por disa komunumo kiel la nia, por kiu ofte fizike malfacilas aliri siajn kulturaĵojn. Jukka Pietiläinen spuras la historion de eterne aktuala demando, la prilingva ideologio de nia movado: kiel ni idee vojis ekde eventuale unulingva homaro, penso trovebla ĉe Zamenhof, tra „la” lingva problemo de Lapenna, ĝis la agnosko, kun la generacio de Tyresö (1969), de pluroblaj lingvaj problemoj kaj multlingveco kiel valoro. Pietiläinen pravas kaj ilustras la idearan evoluon per ĉerpo el multaj trafoliumitaj revuartikoloj, kongresrezolucioj k.s. Aparta merito lia estas larĝe pentri la eksteresperantujan fonon kaj priskribi la rolon de niaj eksteraj rilatoj, kulminintaj en alianciĝo kun la Unesko-subtenita „nova monda lingva ordo”. Post Unesko, venas UN: Edmond Brent lupeas la rilatojn inter UEA kaj Unuiĝintaj Nacioj, montrante ankaŭ problemojn malantaŭ ŝajne harmonia valorkomuneco. Grégoire Maertens prilumas kial kaj kiel prosperis en la lastaj tridek jaroj agadflanko malpli atentata ol la strikte movadaj peripetioj: la financa stabileco de UEA. Li opinias ke la ekspansio de UEA en la 80-aj jaroj, kun centroj ankaŭ en Antverpeno, Budapeŝto kaj Novjorko, estis sekvenda vojo. So Gilsu detalas la evoluojn de nia movado en Azio inter 1989 kaj 1995, kiam li estis UEA-estrarano pri tiu fako.

Kaj la deserto

Fine, pri la lasta sekcio mi konfesu ke mi legis ĝin antaŭ la aliaj, kiel infano voranta la deserton antaŭ la ĉefplado: „Anekdotoj kaj rememoroj”. Mi rezignu pri vicigo de ĉiuj 23 nomoj, kies kontribuoj tre varias laŭ kvanto kaj karaktero. Kelkaj mallonge sed suke anekdotas pri eventoj kiel aŭtobusa paneo survoje al Bona Espero (Eliza Kehlet) aŭ regula sendado de kato-fota libro (Marjorie Boulton) aŭ citas, plej persone, sian taglibron pri la konatiĝo kun Tonkin (Wera Blanke). Aliaj kontribuoj alportas movadhistoriajn novaĵojn (novajn almenaŭ por mi), kiel detalojn pri trans-ferkurtena, soveta vizito de Tonkin en 1975 (Mikaelo Bronŝtejn) aŭ pri prelego de Lapenna pri studentaj movadoj en Tyresö (Tomas Jansson). Estas tre interese analizi kun Hans Michael Maitzen momentfoton el silvestra balo de 1964/65. Ĉi-sekcio aparte elstaras, pro sperta mikso de personaj rememoroj kaj historiografiaj detaloj, panoramo de Ivo Osibov pri la agado de TEJO en la 1960-aj jaroj.

István Ertl

Al Humphrey Tonkin, anagramo

Persone:

*Oratoro kun balail’
La boreal-kuiranto
La kela buro-tirano
Re la libra konatulo
Akra, ribelonta ulo
La bar-erotika nulo
Li, brutala koreano
Betonulo kria al ar’
Li? O, nura kabareto!*

Anatomie:

Erotika balanulo

Zoologie:

*Bela krotala urino
Li: arta, kurba leono
Ne la orta karibuo
Bone kuri al la rato
Re al kuna iro, blato!
La bena krotalo iru
La kolera bruto nia*

Kaj krome:

*Ora latrino kabula
Kuna retiro al baro
La brila EU-kartono
La eura kontbarilo
La eliro kun aborto
La rea kino-brutalo*

Kaj, fine, dediĉo kiu ne presiĝis en la libro:

Ni kore, al la bruto



Recenzo de recenzo

En la revuo *Esperanto* 2010/10 (p. 207) aperis recenzo de Jorge Camacho titolita "Memoro pri la Nakbo: Ĉu la libro de la jaro?". La proponata "libro de la jaro" estas esperantigo de franclingva originalo "Kiel Israelo elpelis la palestinanojn 1947-1949" far D. Vidal.

S-ro Camacho rerakontas la argumentaron de la libro sen-opone, fakte aprobe, finante la artikolon per jenaj vortoj:

Lingvaj malglataĵoj "estas bagatelo kompare kun la graveco de ĉi verko, tiom valora por nia plu-kompreno de la mondo, ke mi nomus ĝin senhezite la libro de la jaro 2009".

Do mi parolu ĝuste pri la artikolo de Camacho, kiu necesigas korektojn kaj komentojn. Misprezentoj kaj konfuzoj komenciĝas de la titolo mem.

1) En 1947-1949 kaj antaŭe "palestinanoj" kaj "Palestino" referencis al la tiama protektorato de Britujo – la lando de antikva Israelo (s-ro Camacho prave mencias tion). "Judojn – al Palestino!" – estis slogano de antisemitaj marĉoj en Eŭropo en la 1930-aj. La termino "Palestina popolo" (por islamaj fuĝintoj de la unua Arab-Israella milito de 1947-1949) estis inventita far KGB en USSR post 1967-a jaro.

2) Fuĝintoj (elpelatoj) estas ofta rezulto de militoj. Ekzemple post la 2-a mondmilito en Eŭropo oni elpelis germanojn el Ĉeĥoslovakio, kaj prusianojn el Orienta Prusio (nun parto de Rusio): ĉiujn! Do ankaŭ dum Arab/Israella milito de 1947-1949 parto de islamanoj estis elpelitaj aŭ mem fuĝis el Israelo. Tamen multaj restis (kaj iĝis civitanoj de Israelo). Do pli ĝusta titolo devus esti "Kiel Israelo ne elpelis ĉiujn islamanojn...". En la sama tempo proksimume 600 000 judoj estis elpelitaj el afrikaj kaj la najbaraj islamaj landoj en Israelon. Okazis do popol-interŝanĝo.

En Israelo (samkiel en Eŭropo) oni akceptis la ricevitaĵajn fuĝintojn, kiuj fariĝis civitanoj.

Tamen la islamaj landoj rezignis de siaj fuĝintoj kaj intence tenas ilin kiel sekan pulvon por la sekva stadio de la eterna Islam-Israella milito – la unua specialaĵo de ĉi-problemo.

La dua specialaĵo estas ke la islamaj landoj intence tenas la fuĝintojn en mizera stato jam dum jardekoj por propagandaj celoj. La restaŭro de Israelo kaj ĝia liberiĝo el la du-mil-jara kolonia jugo ekzemplas plej unikan sukceson de kontraŭ-kolonialisma batalo. Sed por islamanoj tio signifas nur mallarĝiĝon de la iama islama regno (kun la fuĝintoj kiel peonoj en la batalo). Reviviĝo de Israelo el cindro estas dramo por la fuĝintoj, sed certe ne kiel la Katastrofo (totala masakro, Holokaŭsto) de judoj en Eŭropo en la 1940-aj aŭ de armenoj en Turkio fine de la 1910-aj. Nomante la tagon de reapero de Israelo per araba vorto Nakba (Katastrofo) ili penas promocii sian kazon far trivialigo de la vera Katastrofo.

Tamen pri ĉio tia ne temas en la artikolo de Camacho. Kio do estas "tiom valora por nia plu-kompreno de la mondo" nun en 2010 en tiu historio? Hipokriteco, "duobla normo" ĉiam, kiam temas pri Israelo (delonge rimarkigita far Eric Hoffer). Jen kio supozeble motivis la artikolon de s-ro Camacho.

www.resonoelusono.com/Israelo/AntauvidoDeHoffer.html

Plua legaĵo: www.resonoelusono.com/Israelo/Israelo.html

Alexander Gofen

Ne recenzi recenzon

Mi estis ĉagrenita renkonti en la lasta n-ro kontraŭ-israelan artikolon, en masko de simpla libro-recenzo. Mi klarigu: La libro sistemece entenas (kiel montras legado de la recenzo) nur unu-flankajn 'faktojn' pri serioza,

kompleksa kaj multifaceta konflikto. Nur unu ekzemplo – la libro kaj la recenzo "ial forgesas" menci la fundamentan fakton, ke tuj post la decido de UNO dividi Palestinon en du landojn, juda kaj araba, la palestinanoj komencis militi, provante ekstermi la judajn loĝantojn.

Sed mi ne volas nun recenzi la recenzon (kvankam dubinde ĝi estis verkita ĝuste de Georgo Camacho, konata pri sia kontraŭo al Israelo, do neniel objektiva). Estas simple domaĝe ke la oficiala organo de neŭtrala UEA entute enmiksiĝas politike.

Doron Modan

Ni estu kreantoj

Amuza estas la diskuto inter Anna Löwenstein kaj legantoj de *Esperanto* pri "poezia stilo" en Esperanto. Kiel oni atendis, "simplaj esperantistoj" subtenis A.L., sed "korifeoj de Esperanta literaturo" moke oponis ŝin.

La kialo de neologismemo ofte kuŝas ne en iu speciala strebo al elita, specifa lingvaĵo, sed en simpla pigreco kaj foresto de logika pensado. Por kio perforti sian menson, eltrovante kaj inventante Esperantajn vortojn, kiam tiel facilas simple preni la jam ekzistantajn vortojn el iu nacia lingvo! Tio povas esti absoluta sinonimo (tiam al la nova vorto oni insiste atribuas pure poezian econ, ekz., printempo – primavero).

Sed ĉu poezio en Esperanto estas des pli bona, ju pli strikte ĝi sekvas la eŭropajn ekzemplojn? Ĉu konataj vortoj, eĉ en Esperanta kadro, tiel ĝojigas la animojn de eŭropaj legantoj? Aŭ tiuj vortoj simple rolas kiel "insuloj de sekureco" en la obskura maro de fremda lingvo, kie la radikoj eble estas kompreneblaj, sed multaj vortoj ne, ĝuste pro sia tipe Esperanta kunmetita formo. Ja oni devas PENSI por kompreni ilin! Kaj tiu afero estas absolute nekutima kaj neagrable por plimulto da homoj, kaj inter ili – ho ve! – ankaŭ por plimulto da esperantistoj.

Kiam mi instruis Esperanton, mi ripetadis al miaj gelernantoj: "Esperanto estas krea lingvo, kaj VI kreas ĝin! Uzante la lingvon, vi konstante kreas novajn vortojn, novajn nociojn. Kaj ne gravas, ke preskaŭ ĉiuj viaj kreaĵoj jam estas envortigitaj kaj uzitaj en ĉiutaga lingvaĵo. Tio signifas nur, ke vi havas saman krekapablon, kiel multaj homoj antaŭ vi, ke la homaro vere povas havi komunan lingvon. Kaj la uzado de la lingvo estas konstanta kreado, ĉar kiam vi komprenas signifon de kunmetita vorto, vi sekvas la vojon de tiu, kiu kreis ĝin, kaj tiamaniere kunkreas".

Nia lingvo havas senlimajn esprimeblecojn por esprimi ne nur sentojn kaj emociojn, sed ankaŭ nociojn kaj pensojn. Laŭ la hipotezo de Sapir-Whorf, la lingvo determinas la "mondon", en kiu vivas la parolanta persono. Do, uzante Esperanton, ni povas krei apartan mondon, foje konstruitan tute alie, kiam ni uzas nekutimajn radik- kaj vortkunmetojn. Per Esperanto ni povas esprimi tion, kio ne eblas en "normala" etna lingvo. Kiel mi komprenas, ĝuste tio estas tasko de poezio: krei novan mondon, ĉu ne?

"Ĉiu poeto, verkisto, estas aparta mondo" – eldiro, kiun oni atribuas jen al Ŝekspiro, jen al Cervantes. Sed kio malfacilas en la etna lingvo, estas nekompareble pli simple atingeblo en Esperanto; ja se ajnan etnan lingvon ni povas kompari kun vastega tera vojo, betonita per milionoj da spuroj de paŝintoj sur ĝi, tiam Esperanto similas al vasta stepo, kovrita de pura blanka neĝo, sur kiu jen kaj jen videblas ĉenetoj da spuroj: de Auld, Kalocsay, Mihalski, De Kock. Ili kunkreis nian mondon, nian lingvon. Sed kiom da spaco por kreado restis! Estu ankaŭ ni kreantoj, sed ne konsumantoj!

Tatjana Auderskaja

LA SUBAJN TITOLOJN MENDU ĈE LA LIBROSERVO DE UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Bv. atenti ke por varoj sendotaj al adresoj en Eŭropa Unio al ilia neta prezo aldoniĝas aldonvalora imposto: 6% por libroj kaj periodaĵoj kaj 19% por ĉio alia. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas 10% por sendokostoj (minimуме 4,00 eŭroj). Antaŭdankon pro via mendo! Ĝisdata katalogo de haveblaj varoj estas ĉe www.uea.org/katalogo/.

Biografio de Nakagaki Kozirô (Nakagaki Kozirô – Nittyû esuperantisuto no si). Iwao Shibata. Oosaka-si: Riveroj, 2010. 165p. 21cm. ISBN 9784947691262. Japanlingva studo pri la vivo kaj verkoj de Nakagaki Kozirô (1894-1971), unu el la pioniroj de la japana Esperanto-movado. € 13,80

Diritti linguistici, I. Multilinguismo e Società 2010. Div. Red. Davide Astori. Pisa: Edistudio, 2010. 94p. 24cm. Itallingva. ISSN 20364482. Aktoj de la studtago la 25-a de novembro 2008 en Firenze, dediĉita al la temo "2008: Internacia jaro de la lingvoj, homaj rajtoj kaj lingvaj rajtoj". € 15,00

Enkonduko en la studadon de Markso, Engelso kaj Lenino. Jozefo Ŝlejŝtejno. El la germana trad. V. Lutermano. Embres-et-Castelmaure: MAS, 2010. 273p. 21cm. ISBN 9782918300274. Analizo de la

tri klasikuloj, kun abundo da citaĵoj. € 18,00

Esperantaj ekslibrisoj kaj punktoj / Esperanckie ekslibrisy i koronki. El la laborejo de Jozefo Golec / Z pracowni Józefa Golca. Henryk Kosicki. Sopot: Józef Golec, 2009. 100p. 24cm. Bind. Du-lingva (pola, E). Ilustrita katalogo de Esperanto-rilataj ekslibrisoj kaj punktoj, eldonita okaze de la 94-a UK kaj akompananta la samtitolan ekspozicion. € 6,00

Flugi kun kakatuoj. Trevor Steele. Antverpeno: FEL, 2010. 254p. 21cm. ISBN 9789077066461. Originala romano pri la invado kaj okupo de Okcidenta Aŭstralio far britaj enmigrintoj. € 15,60

Jerusalemo liberigita. Torquato Tasso. El la itala trad. E. Dondi. Chapecó: Finto, 2010. 538p. 22cm. Bind. Kromkovrilo. Grandioza epopeo pri la unua Krucmilito. € 65,70


José Martí – de kie kreskas

la palmo. Maritza Gutiérrez. Embres-et-Castelmaure: MAS, 2010. 49p. 21cm. ISBN 9782918300281. Eseo pri la kuba poeto, filozofo, ĵurnalisto kaj verkisto; kun specimenaj tekstoj esperantigitaj de la aŭtoro. € 7,50

Kardo sur kasko / Bodil na šlema. Ivanička Maĝarova. Amadeus, 2010. 64p. 17cm. Du-lingva (E, bulgara). ISBN 9789549897227. Manpleno da hajkoj dividitaj en tri ciklojn. € 3,00

Karesa fantazio / Laskavá fantazie. Čestmír Vidman. En Esperanton trad. J. Krolupper, J. Patera, M. Turková. Praha, 2010. 117p. 17cm. Du-lingva (Esperanto, ĉeĥa). Ilus. ISBN 9788087241080. Poemoj kaj prozaĵetoj dediĉitaj al Palata – Hejmo por vidhandikapitoj, kie la aŭtoro loĝas, kaj al Skokovy, kie li partoprenis en E-kursoj. € 7,50




Kernpunktoj de la socia demando en la vivonecesoj de la nuntempo kaj de la estonteco, La. Rudolf Steiner. El la germana trad. W.



Nüesch. Berno: La tradukinto, 2010. 112p. 21cm. Ideoj publikigitaj antaŭ preskaŭ unu jarcento. Ĉu ili ankoraŭ validas? € 9,00

Komentoj al la "Komunista Manifesto". Arnold Petersen. Kompilis kaj el la angla trad. T. Veder. Embres-et-Castelmaure: MAS, 2010. 49p. 21cm. ISBN 9782918300199. Vidpunktoj de usona maldekstrema politikisto. € 7,50

Komunismo estas bona partio – diru al ĝi JES!. La. Roger Martelli. El la franca trad. V. Lutermano. Embres-et-Castelmaure: MAS, 2010. 76p. 21cm. ISBN 9782918300366. La unua



parto de ampleksa verko
apologianta komunismom.
€ 7,50

Legolibreto VI. Red. J. Drahotová kun helpo de M. Kolářová, K. Votoček. Jindřiška Drahotová, 2010. 63p. 21cm. ISBN 9788025481165. Kolekto de mallongaj tekstoj diverstemaj. € 4,50

L. L. Zamenhof (1859-1917).

Esperanto, Hillelismus (Homaranismus) und die "jüdische Frage" in Ost- und Westeuropa. Andreas Künzli. Wiesbaden: Harrassowitz, 2010. 538+24p. 25cm. Ilus. Bind. Germanlingva. ISBN 9783447062329. Ampleksa kaj bone dokumentita verko pri la iniciatinto de Esperanto kaj pri kelkaj projektoj liaj, kun emfazo sur lia judeco. € 99,90

Noveloj de Akutagawa Ryūnosuke. El la japana

trad. Konisi Gaku. Toyonaka-si: JEL, 2010. 21p. 105cm. Du-lingva (japana, E). ISBN 9784888870641. 8 ĝuindaj noveloj de japana verkisto, kies nomon portas prestiĝa literatura premio en Japanio. € 10,50

Pri la juda demando. Karlo Markso. El la germana trad. V. Lutermano. Embres-et-Castelmaure: MAS, 2010. 51p. 21cm. ISBN 9782918300298. Frua teksto de Marx, ĝis hodiaŭ pridiskutata kaj pridisputata. € 7,50

Proverbaro tutmonda. Kelkaj miloj da proverboj el 90 lingvoj. André Cherpillod. Courgenard: La Blanchetière, 2010. 157p. 21cm. ISBN 2906134899. Ne nur el, sed ankaŭ en aliaj lingvoj! € 13,50

Raportoj el Japanio 13. Jasuo Hori. Maebaŝi: Horizonte, 2010. 185p. 21cm. Ilus. ISBN 978493088104.

Preskaŭ 30 raportoj kaj mallongaj eseoj pri diversaj temoj. € 15,00

Ronke, la ĵaluzulino.

Adebayo Ola Afolaranmi. Embres-et-Castelmaure: MAS, 2010. 85p. 21cm. ISBN 9782918300359. Ĉi tiu originala ses-akta dramo revoluas ĉirkaŭ la universala sento de ĵaluzo, ĉi tie en kunteksto de malsamaj kulturoj kaj kredoj. € 7,50

Stilekzercoj. Raymond Queneau. El la franca trad. I. Ertl. Thaumiers: La Kancerkliniko, sj (2a eld). 40p. 21cm. Suplemento al *La Kancerlinko*. ISSN 03985822. Stilpoluraj ekzercoj. € 5,40

Ŝipeto Narklo. Dmitrij Ŝevĉenko, Anna Striganova. Moskvo: Impeto, 2010. 47+6p. 17cm. ISBN 9785716102101. Ĉarma fabelo pri ŝipeto, forlasita en iu norda maro, kiu ekvivis.

Kun same ĉarmaj koloraj ilustraĵoj. € 13,80

NELIBROJ

Civilizacio de Nilo / Lulilo de Dioj. Roman Dobrzyński. Varsovio: MOviDO, 2010. 23 + 19min. Filmo pri la plej longa rivero en la mondo plus filmo pri la azteka urbo Teotihuacán. DVD. € 12,00

Fonto. Chapecó/Barlaston: Fonto/EAB, 2010. La tuta kolekto de *Fonto* (1980-2006; 312 numeroj; 11 812 paĝoj) en formatoj jpeg kaj pdf. Komputila DVD. € 10,50

Globkrajono esperanto.net. Helmond: La Fontano, 2010. Nigra globkrajono, kiu skribas nigre. El recikligita plasto (96%). € 0,90

Globkrajonoj esperanto.net. Helmond: La Fontano, 2010. Kvar nigraj globkrajonoj, kiuj skribas nigre; en plasta ŭeto. El recikligita plasto (96%). € 2,70

Rogener Pavinski nova redaktoro de *Kontakto*

Rogener Pavinski sekvas Paŭlon Moĵajev kiel redaktoro de la revuo *Kontakto*. La Estraro de UEA konfirmis la decidon de la Estraro de TEJO, kiu elektis Pavinski post publika konkurso inter pli ol 20 kandidatoj.

La juna brazilano aktivas diverskampe de pluraj jaroj. Kiel filmisto li estis kunkreinto de la filmo *Esperanto estas...*. Kiel muzikisto li estis interalie voĉo de la grupo Supernova, kiu famiĝis precipe per siaj prezentadoj en la pasintjaraj UK kaj IJK. De 2004 ĝis 2006 li redaktis la bultenon *Momenton!* de Brazila Esperantista Junulara Organizo, kaj de 2007 ĝis 2009 li estis estrarano de TEJO.

Rogener Pavinski estis elektita kiel redaktoro por du jaroj. La unua *Kontakto* sub lia redakto estos n-ro 5 de la nuna jaro. "Mi multe dankas pro la konfido, kiun la



TEJO-estraro havas je miaj kapabloj", li diris post sia elekto. "Mi strebos doni novan vivon al la revuo kaj labori, por ke ĝi estu pli alloga, kultura kaj freŝtema. Mi planas multajn novaĵojn kaj invitas la esperantistojn partopreni en la kreado de la nova *Kontakto*".

La revuon *Kontakto* ricevas ĉiu individua membro de TEJO. Ekde 2011 ĝi enhavos ankaŭ la bultenon *TEJO tutmonde*, kiu ĉesos aperi kiel aparta eldonaĵo. Oni povas ekaboni al *Kontakto* ankaŭ aparte pagante la subtenan kotizon Patrono de TEJO

aŭ simplan abonon. Favana eblo por kluboj, kursoj k.a. estas kolektiva abono de minimume 6 ekzempleroj. Se ĉiuj ekzempleroj estos sendataj en unu pakaĵo al la sama adreso, oni ricevas rabaton de 40% el la plena abonprezo; se la numeroj estos sendataj rekte al la unuopaj ricevantoj, la rabato estas 20%.

Reta abonilo: www.uea.org/alighoj/revu_abon.php

DUMVIVAJ MEMBROJ:

Usono: M. J. Cuddy.

DUMVIVAJ PATRONOJ DE TEJO:

Japanio: T. Honda Machimura.

DONACOJ

Ĝis la 15-a de oktobro 2010:

Konto Afriko: Germanio: J. Hamann 14,74. Nederlando: C. & R. Bosson 25,00; H. Wernik 160,00. Svedio: J. Hammarberg 21,79. *Sumo ĉi-jara: 1206,14.*

Fondaĵo Ameriko: Svedio: J. Hammarberg 32,59. *Sumo ĉi-jara: 1276,24.*

Fondaĵo Azio: Nederlando: A. & H. Bakker (Indonezio) 100,00. *Sumo ĉi-jara: 1783,10.*

Volontula fondaĵo: Aŭkcio en la 95-a UK: 792,19. *Sumo ĉi-jara: 842,19.*

Ĝenerala kaso: Nederlando: Anonima 50,07. *Sumo ĉi-jara: 658,12.*

Al ĉiuj koran dankon! UEA

UEA invitas prelegi en la Kopenhaga IKU-sesio

Dum la 96-a UK en Kopenhago okazos la 64-a sesio de Internacia Kongresa Universitato.

UEA invitas universitatajn profesorojn, docentojn kaj personojn kun simila kvalifiko sendi proponojn de prelegoj al la sekretario de IKU, prof. Amri Wandel, PK 767, IL-71799 Makabim, Modiin, Israelo; rete: amri@huji.ac.il, ĝis 2011-01-31 (sed prefere pli frue).

Lige kun IKU okazos studsesio de Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS) kunlabore kun UEA. Proponantoj de IKU-prelego povas samtempe proponi AIS-kurson, kies unua prelego estos parto de IKU kaj kiu aldone havos du daŭrigajn prelegojn. Oni bv. indiki, ĉu la IKU-propono estu konsiderata ankaŭ kiel AIS-kurso.

La prelegoj estu pri interesaj, allogaj temoj kaj taŭgaj por klera publiko. Estos aparte bonvenaj prelegoj lige kun la Internacia Jaro de Junularo (la kongresa temo).

Ĉiu propono enhavu mallongan resumon de la prelego kaj koncizan biografieton de la preleganto (kune ne pli ol unu paĝo).

La proponoj estos prijuĝataj de la IKU-komisiono kaj sekve la Estraro de UEA decidus, kiuj estos akceptitaj. La proponintoj estos informitaj pri la decido ĝis 2011-04-30. La sukcesaj kandidatoj devos sendi kompletan tekston de siaj prelegoj al UEA ĝis 2011-05-31, por publikigo en la IKU-libro.

Ĉiu preleganto devas esti kongresano kaj mem zorgi pri sia aliĝo.

Prelego estos rekompencita per honorario de 250 eŭroj. Pliaj detaloj kaj antaŭaj IKU-prelegoj kaj -resumoj troviĝas en la IKU-paĝo ĉe <http://uea.org/dokumentoj/IKU>.

Esperanto de nivelo al nivelo. Zs. Kóródy, M. Kovács, P. Salomonné Csíszár, L. Szabó. Red. kaj esperantigis M. Kovács. Budapest: ITK, 2008. 136p. 24cm. ISBN 9789632840406. Kolorilus. Helpmaterialo por prepariĝi por la ekzamenoj laŭ la Komuna Eŭropa Referenckadro. €10,50. Sesona rabato ekde tri ekzempleroj.



Metodiko de la Esperanto-instruado. Rudolf Rakuša. Rotterdam: UEA, 1991 (3-a eld.). 189p. 20cm. ISBN 929017045X. Baza pedagogia gvidilo por instruantoj de la internacia lingvo. €4,80. Triona rabato ekde tri ekzempleroj.



La 18-a Internacia Semajno en Katalunio



130 esperantistojn el dudeko da landoj allogis komence de oktobro al la apudmara urbo Coma-Ruga la jam tradicie riĉa programo kaj amika atmosfero de la ĉiujara aŭtuna aranĝo sur la kataluna marbordo – la 18-a Internacia Esperanto-Semajno de la Kulturo kaj Turismo.

La organizantoj, krom varma kaj sunplena vetero, mendis kvalitajn preleg(ant)ojn: Gian Carlo Fighiera: "Kelkaj noveloj de Boccaccio", Renato Corsetti: "Por ke lingvo estu tutmonda ne sufiĉas paroli ĝin eŭrope", Anna Löwenstein: "Romo antaŭ 2000 jaroj", Gian Carlo Fighiera: "Japana filmo *Rashomon* pri la kvar veroj", Antonio Marco Botella: "Centjara datreveno de la granda poeto Miguel Hernandez", la geedzoj Michéle kaj Hubert de Meyere: "Belgio, la lando de arto, scienco

kaj folkloro", la geedzoj An Jong kaj Ko Kyung el Koreio: "Solidareco de Esperanto" kaj "Folkloraj koreaj kantoj", Wolfgang Guenther: "Kiosko de Levante". Rektmetodan kurson por komencantoj gvidis Stano Marček. Okazis du ontagaj kaj unu tutaga ekskurso al la Muzeo "Pau Casal" en San Salvador kun muzika koncerto, al la Monaĥejo Monserrat, kun vizito de la vinkelo "Cooperativa Agrícola de Vila-rodona" kaj al "Fondaĵo Apel-les" en El Vendrell. La organizanto Luis Serrano Pérez gvidis la debaton "Kio

pri la Esperanta gramatiko, ĉu vi realigus modifojn?". Okazis du (!) interkonaj vesperoj kun ĉampanjo "Esperanto" kaj bongustaj specialaĵoj, DVD-prezento de la opero *La Bohème*, folkloraj vesperoj kun la ensemblo "Montjuic", kun havana muziko kaj cremat (rumo bruligita kun kafo) kun aliaj specialaĵoj. La premio "Ada Sikorska-Fighiera" estis ĉi-jare atribuita al la eksa prezidantino de Hispana Esperanto-Federacio kaj vigla aktivulino kaj prelegantino M. Rafaela Urueña. **Stano Marček**

Seminario de la Ĉina Sekcio de ILEI en Taiyuan



De la 1-a ĝis la 11-a de aŭgusto 2010 okazis en la urbo Taiyuan, Shanxi-provinco, la norda Ĉinio, Seminario de la Ĉina Sekcio de ILEI.

Al la seminario aliĝis 59 personoj, sed partoprenis 51 el 20 ĉinaj urboj, 6 el 4 aliaj landoj: Danio kaj Suda Koreio po 1, Usono kaj Japanio po 2. Du personoj, kiuj ne povis fizike partopreni en la seminario pagis kotizon.

La programo de la seminario estis riĉa, abunda kaj bonkvalita. Okazis 13 prelegoj (inkluzive de unu reta pere de Skajpo) pri edukado kaj metodoj de E-instruado, 4 raportoj pri E-instruado en ĉinaj kaj japanaj lernejoj, 2 demonstraj instruadoj kaj 4 E-kursoj (2 por pli ol 25 komencintoj kaj progresantoj, 2 por 50 infanoj).

Ni agrable pasigis la tempon dum la vesperaj programoj kaj ekskursoj. **Stefan MacGill**

Apliko de Esperanto en la profesia agado

En la bulgaraj urboj Karlovo kaj Sopot okazis inter la 11-a kaj la 14-a de junio 2010 la 2-a internacia seminario "Apliko de Esperanto en profesia agado" (AEPA), kies organizantoj estis AIS- Bulgario, Bulgara E- Asocio, Internacia Universitato Karlovo kaj la Regiona Estraro de la neesperantista organizo "Scienc-teknika Asocio" en Bulgario.

Organizis ĝin esperantistoj, sed partoprenis ankaŭ sciencistoj kaj fakuloj neesperantistoj, kun rekta traduko Esperante-bulgare-Esperante.

La Solena Inaŭguro okazis en la solena halo de la urbodomo de Karlovo. Partoprenis reprezentantoj de la oficialaj instancoj, radio, televido, gazetaro kaj urbanoj. La seminarion inaŭguris prof. Bojidar Leonov, prezidanto de AIS-Bulgario. En la festparolo de la urbestro estis esprimita apogo flanke de la oficialaj instancoj al la agado de AIS, substrekkante la aŭtoritaton de la Internacia Universitato Karlovo kiel eduk-kultura centro.

Post la Inaŭguro okazis Festkunveno omaĝe al la ĵurnalistino Ada Fighiera-Sikorska kaj ŝia patro, la generalo Sikorski.

Sabate la prelegoj kaj la diskutoj okazis en la urbo Sopot, dimanĉe kaj lunde en la Internacia Universitato en Karlovo.

La prezidanto de Bulgara Esperanto Asocio, Inĝ. Petar Todorov, honorigis per medaloj du eminentulojn de la E-movado,



Inaŭguro de la 7-a Bakalaŭra Universitata Studadsesio

D-ron Gian Carlo Fighiera kaj prof. Hans Dietrich Quednau, pro ilia longjara aktiva partopreno en la internacia E-movado kaj kunlaboro kun BEA. AEPA-2010, dum kiu okazis kvardeko da valoraj fakaj prelegoj, estis inkluzivigita en la programon de BUS-7 de AIS-San Marino (Bakalaŭra Universitata Studadsesio), kies profesoroj gvidis kursojn por la studentoj. La seminario, kiel daŭrigo de la 1-a AEPA en 2009, ludis sian rolon por propagando de Esperanto kaj ĝia apliko en profesiaj kontaktoj, kaj denove sukcese plenumis sian bazan celon prezenti antaŭ neesperantistaj fakuloj kaj oficialuloj, ke Esperanto estas ne nur komuna lingvo por babilado, amuzo kaj kontaktoj inter la esperantistoj, sed povas esti oficiala lingvo por kontaktoj kaj kunlaboro en diversaj sciencaj kaj profesiaj fakaj seminarioj.

Bojidar Leonov

46-aj Baltiaj Esperanto-Tagoj

La jam tradicia renkontiĝo BET okazis en la urbo Visaginas, kiu famas en Litovio pro la Ignalina nuklea atomcentralo, la bela naturo kiu ĉirkaŭas ĝin, kaj pro multnacieco.

Transire de junio al julio (26 jun – 04 jul 2010) pli ol 150 esperantistoj el 18 landoj elektis BET por esti en bona Esperanta etoso.

Kutimaj programeroj bonvenigis la partoprenantojn: Somera universitato, prelegoj pri la litovaj lingvo kaj historio, trinivelaj kursoj de Esperanto, ekskursoj en la ĉirkaŭaĵo, akcepto ĉe la urbestro. Inter la prelegantoj estis konataj


esperantistoj kiel Petro Baláz, Mikaelo Bronštejn, Mikaelo Cvik, Petras Čeliasukas, Halina Gorecka, Stano Marček, Aleksander Korĵenkov kaj aliaj. Ne tradiciaj estis la renkontiĝoj ĉe lignofajro, organizitaj de lokaj esperantistoj, ornamo de Paŭloj kaj Petroj per kverkaj kronoj, kvizoj kaj ludvespero aranĝitaj de Nora Caragea kaj de Mikaelo Bronštejn. Ĉiutage aperis kolora gazeto *Argenta gruo*, kiu raportis pri la okazintaĵoj en la Baltiaj Esperanto-tagoj. Vesperajn programojn oni devis parte ŝanĝi pro la funebro en Litovio: mortis la litova eksprezidento A.

Brazauskas, sed la koncertoj kiujn kongresanoj ĝuis, estis vere interesaj: de rusa kanta kaj danca ensemblo kaj ukraina folkloro grupo, la kantistino Turasova-Abra. Koncertis ankaŭ Mikaelo Bronštejn kaj la esperantista grupo "Asorti", kies membroj Jelena kaj Edvardas Piščikai loĝas en Visaginas kaj dum la tuta semajno, helpataj de Genadijus Jefimovas, ege sindediĉe zorgis pri ĉiuj kaj ĉio. La venonta BET okazos en la latva urbo Priekulė ekde la 9-a de julio ĝis la 16-a de julio kaj havos la ĉefan temon "Latva folkloro tra jarcentoj". Bonvolu trovi la aliĝilon ĉe www.esperanto.lt.

Graĵina Opulskienė



Forpasoj



Arthur Baur (1915-2010) forpasis la 17-an de septembro en Männedorf (Svislando). Elektita en 1980, li estis la dojeno de la Honoraj Membroj de UEA. Baur studis en la universitatoj de Zuriko, Upsalo kaj Stokholmo la germanan, anglan, retoromanĉan kaj islandan filologiojn. Post doktoriĝo li laboris kiel ĵurnalisto ĝis sia emeritiĝo. De 1975 li membris en la Nacia Unesko-komisiono de Svislando. Baur lernis Esperanton en 1930 en gimnazio kaj membriĝis en E-Societo de Zuriko kaj Svisa E-Societo. En 1939 li aliĝis al UEA. De 1932 ĝis 1933 li redaktis la bultenon *La Sonilo Malgranda*, poste renomitan kiel *Ĉiulandulo*. De 1980 ĝis 1986 li estis prezidanto de Svisa E-Societo kaj redaktoro de *Svisa Esperanto-Revuo*. En 1959 SES elektis lin honora membro. De 1947 ĝis 1991 li gvidis la E-elsendojn de Svisa Radio Internacia, ofte helpate de sia edzino Heidi Baur-Sallenbach (1916-2006). Li gvidis ankaŭ la informservojn de la 31-a UK en 1939 kaj la 32-a en 1947, ambaŭ en Berno, kaj la gazetaran servon de la 64-a en 1979 en Lucerno. Lige kun la UK en 1939 aperis en lia redakto *Svisa antologio*. Por la UK en 1979 li verkis *La fenomeno Svislando*, per kiu la sperta ĵurnalisto kreis modelon por similaj libroj pri aliaj landoj. Li verkis ankaŭ *Esperanto in 5 Lehrbriefen* (1942), *Das Problem*

der internationalen Sprache (1953), *Esperanto per Post* (1958), *Deine zweite Sprache* (1960), *De la utopio al la realeco; Von der Utopie zur Wirklichkeit* (1976), *La retoromanĉa: sorto de la plej malgranda nacia lingvo de Svislando* (1984), *La retoromanĉa: historio kaj nuntempo de la kvara nacia lingvo de Svislando* (1995) kaj *Die Geschichte der Esperanto-Sendungen aus der Schweiz* (1998). En Svislando li konatiĝis ankaŭ pro siaj lerniloj de la svisgermana (alemana) lingvo kaj de libroj pri la retoromanĉa.

Satyendra Bandopadhyaya (1923-2010) mortis la 29-an de aŭgusto en Katmanduo. Bengaldevena, li eksciis pri Esperanto en Kalkato junaĝe, sed lernis ĝin nur en 2001, leginte pri kurso de Nepala E-Asocio. Poste li fariĝis fondinto-prezidanto de Orient-Nepala E-Societo.

Axel von Blottnitz (1933-2010) forpasis la 25-an de septembro en Pretorio (Sud-Afriko). Li membriĝis en la Sudafrika E-Asocio en 1973 kaj estis dumviva membro de UEA, delegito kaj fakdelegito pri agrikulturo, etnaj minoritatoj kaj dendrologio.

Pierre Dehan (1917-2010), em. poŝtisto kaj iama fakdelegito pri poŝto kaj turismo, mortis la 13-an de julio en Sainte-Foy-les-Lyon (Francio).

Robert Llorens (1917-2010) mortis la 20-an de septembro en Nice (Francio). Em. instruisto, li estis longe delegito kaj fakdelegito pri turismo kaj internacia korespondado. Li fondis la franclingvan informan revuon *Esperanto-Infos* kaj malfermis en Nice hotelon "Esperanto". De 1984 ĝis 1990 li estis komisiito pri Koresponda Servo Mondskala de UEA.

Vlado Sládeček (1930-2010) mortis la 4-an de junio en Ostrava (Ĉeĥio). Li estis dumviva membro de UEA ekde 1968 kaj fakdelegito pri astrozofio kaj vegetarismo ekde 1970.

ABONTARIFOJ 2011

De la Libroservo de UEA

(prezoj en eŭroj)

Revuo	n-roj jare	jara abono
<i>Brita Esperantisto</i>	2.....	10,00
<i>Bulgara Esperantisto</i>	4.....	12,00
<i>Dia Regno</i> (KELI)	6.....	16,00
ekster Eŭropo		19,00
<i>Esperanto aktuell</i> (germana) ...	6.....	24,00
<i>Esperanto</i> (revuo de UEA)	11.....	38,00*
<i>Esperanto, L'</i> (itala)	6.....	28,00
aerpoŝta aldono		5,00
<i>Espero, La</i> (sveda)	6.....	22,00
<i>Espero Katolika</i>	4.....	29,50
<i>Internacia Pedagogia Revuo</i>	4.....	18,00
<i>Israela Esperantisto</i>	2.....	10,00
<i>Jaro, La</i> (agendo)	1.....	5,50
aerpoŝta aldono		3,50
<i>Juna Amiko</i> (por lernejoj)	3.....	14,00
<i>Kancerkliniko, La</i> (ajnista)	5.....	25,00
<i>Karavelo, La</i> (kultura)	6.....	48,00
<i>Kontakto</i> (revuo de TEJO).....	6.....	23,00*
<i>Kosmos</i> (filozofia).....	2.....	10,00
<i>Lang. Problems & Lang. Planning</i> ..	3.....	70,00
institucioj.....		202,00
<i>Laŭte!</i> (libera tribuno)	6.....	15,00
<i>Litova Stelo</i>	6.....	14,00
aerpoŝta aldono		6,00
<i>Monato</i> (novajmagazino).....	11.....	49,00
aerpoŝta aldono		4,00
(elektronika versio)		29,40
<i>Monde de l'espéranto, Le</i> (franca) ..	4.....	30,00
<i>Norvega Esperantisto</i>	6.....	12,50
<i>Ondo de Esperanto, La</i>	11.....	38,00
aerpoŝta aldono		5,00
(elektronika versio)		12,00
<i>Pola Esperantisto</i>	6.....	
Eŭropo		16,00
Azio, Ameriko.....		20,00
Aŭstralio.....		25,00
aerpoŝta aldono		5,00
<i>Scienco kaj kulturo</i>	6.....	30,00
aerpoŝta aldono		7,00
<i>Sennaciulo / Sennacieca revuo</i> ..	6.....	57,00
aerpoŝta aldono (Eŭropo).....		6,00
aerpoŝta aldono (ekster Eŭropo) ..		12,00
<i>Starto</i> (ĉeĥa)	4.....	10,00
aerpoŝta aldono		3,00
<i>Tempo</i> (kroata)	4.....	10,00

* Abonprezoj de UEA/TEJO-revuoj varias laŭlande. Konsultu la kotiztabelon de UEA. Por ĉiuj gazetoj la abonantoj en Eŭropa Unio aldone pagas imposton de 6%. Informoj validaj je 2010.10.12



RETORIKO

Science redaktita, pense riĉiga verko de Ivo Lapenna. Roterdamo, 1971 (tria eldono). 294p. 20cm. Bindita kun kromkovrilo. Prezo: €19,80. Triona rabato ekde 3 ekz.



En 2009 150 esperantistoj subtenis la agadon de UEA per aliĝo al

Societo Zamenhof

Aliĝu ankaŭ vi al tiu klubo de mecenatoj de UEA! Vi ricevos leterojn de la prezidanto de UEA, inviton al akcepto en UK, kaj specialan donaceton. La kotizon (duoblo de MA por via lando) vi povas pagi al via peranto aŭ rekte al UEA.



PAROLADOJ KAJ PRELEGOJ

Elektitaj paroladoj kaj prelegoj. Paroladoj pri Esperanto, Movado kaj kelkaj aspektoj de niaj lingvo kaj kulturo. La nova eldono enhavas du aldonajn paroladojn neaperintajn en la eldono de 1966. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio, 2009 (dua eldono). 166p. 21cm. Prezo: €9,90. Triona rabato ekde 3 ekz.

ĈU VI SERĈAS KORESPONDAMIKON?

Sendu al *Koresponda Servo Mondskala* jenajn detalojn: nomo, adreso, sekso, aĝo, profesio, geedza stato, kiom da korespondantoj dezirataj, en kiuj landoj kaj pri kiuj temoj. Kunsendu du internaciajn respondkuponojn, aŭ, se ili ne estas aĉeteblaj en via lando, neuzitan poŝtmarkon. *KSM* transdonos viajn informojn al alia(j) korespondemulo(j), kiu(j) konformas al viaj deziroj. Vi ricevos rektan respondon. *KSM* estas servo de UEA.



Koresponda Servo Mondskala
B.P. 6, FR-55000 Longeville-en-Barrois, Francio
www.multimania.com/kosomo


VIZITU VIAN PROPAN DOMON ĈE NIEUWE BINNENWEG 176 EN ROTTERDAMO DUM

MALFERMA TAGO

sabaton la 27-an de novembro 2010 (10h00 - 17h00)

- ★ En la libroservo ĉio rabatita je 10%
- ★ Specialaj ofertoj
- ★ Bazono de esperantaĵoj
- ★ Senpaga loterio
- ★ Kafo kaj teo senpage servataj

Speciala gasto:
MAURO NERVI



Vizitontoj de la Malferma Tago (27 nov.): Kunportu uzitajn poŝtmarkojn por vendado favore al UEA!



Fondaĵo Canuto

Multaj arde deziras membriĝi en UEA, sed ne ĉiuj povas. Via donaco al Fondaĵo Canuto helpos nin teni la kontaktojn kun tiuj kiuj suferas pro transpagaj baroj. Antaŭdankon pro via solidareco!



Kopenhaga kongreso koverte!

Glumarkoj (ø3cm) por la venontjara UK haveblas ĉe la Libroservo de UEA. 12-peca folio kostas €0,90. Triona rabato ekde 3 folioj.




Ziko Marcus Sikosek

Sed homoj kun homoj

Universalaj Kongresoj de Esperanto 1905-2005

Lige kun la centjariĝo de la Universalaj Kongresoj de Esperanto kaj okaze de la 90-a UK, UEA eldonis historian libron pritraktantan la plej grandan kaj gravan regulan eventon en la Esperanta movado. *Sed homoj kun homoj. Universalaj Kongresoj de Esperanto 1905-2005*, kompilita de Ziko Marcus Sikosek, estas abunde ilustrita kaj informriĉa verko, havinda por ĉiu kiu interesiĝas pri la historio de Universalaj Kongresoj. Bindita: €22,50; broŝurita: €16,50. Triona rabato ekde tri ekzempleroj.

EKSKURSO TRA 100 JAROJ



Okaze de la 100-jariĝo de UEA aperis tiu ĉi abunde ilustrita libro de la renoma movada historiisto Ulrich Lins. Ĝi estas intereskapta enkonduko en la historion de UEA kaj kleriga legaĵo por ĉiu esperantisto. Krom ĝenerala historia trarigardo ĝi enhavas artikolojn pri Hector Hodler, la fondinto de

la Asocio, kaj pri Ivo Lapenna, la konstruinto de la moderna UEA. La libron kompletigas laŭjara kroniko, listoj de la prezidantoj, direktoroj kaj redaktoroj, kaj bibliografio.

UTILA ESTAS ALIĜO. Tra la unua jarcento de UEA. Ulrich Lins. Ilus. Rotterdam: UEA 2008. 126p. 24cm. ISBN 978 92 9017 105 8. Prezo: €15,00. Triona rabato ekde 3 ekz.

REMEMOROJ

de

TEODORO SCHWARTZ / TIVADAR SOROS

pri

...la unua mondmilito

MODERNAJ ROBINZONOJ

En la siberia praarbaro
Enkonduko de H. Tonkin.
Berkeley: Bero, 1999
(dua eldono). 9+47p.
22cm. Prezo: €6,00.
Sesona rabato ekde 3 ekz.

...la dua mondmilito

MASKERADO ĈIRKAŬ LA MORTO

Nazimondo en Hungario
Redakto kaj komentario de H. Tonkin.
Rotterdam: UEA, 2001
(dua eldono). 318p.
21cm. Prezo: €16,50.
Triona rabato ekde 3 ekz.

